

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

Antaŭ 50 jaroj Jurij  
Gagarin faris sian  
ĉirkaŭmondan flugon  
Novaĵoj el Esperantujo  
La katastrofo en Japanio  
kaj Eŭropo  
Wikimediaj projektoj  
Wolfgang Kirschstein  
pri la povo de onidiroj  
Adam Smith pri la lingvo  
Ryszard Rokicki:  
“Quo vadis, Esperanto-  
lingvistiko?”  
Jerome K. Jerome. “La  
viro kiu vivis por aliaj”  
Carlo Minnaja pri  
“Literatura Mondo”



2011

4-5

# LA ONDO de esperanto

**INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2011. №4-5 (198-199)**

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefona** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2011**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 590 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 23a paĝo de la februara *Ondo*.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 550 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2011.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2011, №4-5 (198-199).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 21 марта 2011 г.

Цена свободная. Тираж: 550 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Redakcie

Post la aperigo de la redakcia kolumno en la marta *Ondo* kaj de la sama teksto en nia retejo, ni ricevis multajn kortuŝajn leterojn. Ni kore dankas al ĉiuj, kiuj sendis sandezirojn kaj esprimis sian pretecon subteni nin en la nuna tre malfacila situacio. Denove ni vidas, ke amikeco kaj solidareco en Esperantujo estas pli ol vortoj — ili estas ecoj de la adeptoj de la internacia lingvo.

Kelkaj amikoj (ekzemple, Sergej Bronov, kies leteron vi povas legi en la 9a paĝo) decidis ne atendi kaj tuj subteni nin; sed la pli multaj demandis pri la manieroj, en kiuj oni povas helpi al Halina transvivi en Moskvo dum la atendado de operacio.

Oni povas helpi multmaniere. Ni mencias kelkajn.

Se vi, via klubo, aŭ via asocio eldonas informilon paperan aŭ/kaj retan, aperigu artikolon aŭ alvokon, por ke ankaŭ tiuj, kiuj ne legas *La Ondon*, sciu pri nia problemo. Rakontu pri ĝi ankaŭ en klubkunveno, en renkontiĝo. Uzu la pretan artikolon en nia retejo aŭ mem verku resumon de ĝi.

Kontaktu bonfarajn fondaĵojn kaj mecenatojn, kiuj helpas neriĉajn personojn en krizaj situacioj, rakontu al ili pri nia kazo kaj petu helpon aŭ konsilojn pri helpo.

Abonu *La Ondon* por via klubo aŭ/kaj por viaj kontaktoj. Aĉetu niajn librojn kaj instigu aliajn (ekzemple, la organizantojn de tradiciaj esperantistaj renkontiĝoj) mendi ilin en iu el la libroservoj aŭ rekte ĉe ni. Viaj abonoj kaj aĉetoj faros pli prospera nian etan entreprenon, el kies profito ni vivtenas nin dum dudek jaroj.

Fariĝu dumviva abonanto. Kontraŭ 1000-eŭra kotizo vi ricevados *La Ondon* papere (kaj elektronike, se volos) tiom longe, kiom ĝi aperos.

Kontribuu al nia savfonduso. Laŭ proksimuma takso, ni bezonas 20–26 mil eŭrojn (la sumo dependas de la longeco de la restado en Moskvo). Ni mem disponas ĉ. 6 mil eŭrojn (jam 5 mil, ĉar unu monato pasis), do la mankanta sumo estas 14–20 mil eŭroj.

Viajn donacojn vi povas sendi al nia UEA-konto “gore-z” per la kutimaj pagmanieroj, klarigitaj en la *Jarlibro* de UEA; kelkaj el niaj perantoj volonte helpos ĉe transpago.

Se vi loĝas en Pollando aŭ en Ruslando, vi povas ĝiri monon al niaj bankaj kontoj en Olsztyn kaj en Moskvo (petu informojn pri la kontonumeroj), informante nin pri la dato kaj sumo de la pago.

Ni akceptas donacojn per Yandex-denjgi kaj per PayPal. Vidu informojn pri la kontoj en niaj retejoj: <http://www.esperanto.org/Ondo/> kaj <http://sezonoj.ru/>

En *La Ondo* regule aperos informoj pri la evoluo de la monokolekta kampanjo. La unua listo estos publikigita post du monatoj, en la junia *Ondo*. Ĝi estos *jubilea* — la ducenta, kiun ni preparis ekde la refondo antaŭ dudek jaroj.

*Dankon pro via subteno!*

**Aleksander Korĵenkov**

**Sur la kovropaĝo** estas la raketo *Vostok* (Oriento) helpe de kiu antaŭ kvindek jaroj Jurij Gagarin faris la unuan ĉirkaŭteran kosmoŝipan flugon en la historio de la homaro. (*Press-Foto*)

# Jubileo de la kosmotago

Antaŭ 50 jaroj, matene la 12an de aprilo 1961, la sovetia armea piloto Jurij Gagarin per la kosmoŝipo *Vostok 1* faris la unuan en la mondo flugon ĉirkaŭ la terglobo.

Kvankam tiu flugo estis rezulto de klopodoj de multegaj sciencistoj kaj armeanoj, inter kiuj elstaris la ĉefkonstruinto de *Vostok* (Oriento) Sergej Koroljov, ĝuste Gagarin estas menciata, kiam temas pri la “kosmotago”.

Dum jardekoj Gagarin restas homo, kiun konsiderenda plejparto de loĝantoj de Sovetunio daŭre traktas pozitive aŭ neŭtrale — verŝajne, unika okazo. Certe, ekzistas individuoj, kiuj ne ŝatas ĉion, ankaŭ Gagarin-on, sed ili estas treege malmultaj. La unua kosmonaŭto ĝis nun estas heroo por la ruslandanoj. Kelkaj kialoj de tio estas evidentaj, kelkaj ne.

Gagarin — sovetiano! — la unua en la mondo flugis en kosmon, kio signifis grandiozan paŝon antaŭen ne nur el scienca vidpunkto, sed ankaŭ el la geopolitika. Nikita Ĥruŝĉov en 1957 diris, ke USSR devos ĉiuflanke “atingi kaj superi” Usonon, kaj kvankam li parolis pri la ekonomio, la sukcesego de la flugo de Gagarin estis grava pluso en tiu kontraŭstaro. (Kvankam estas senduba fakto, ke ĉi tiu kontraŭstaro estis nur unuflanka; nome USSR konkuris kun Usono, almenaŭ deklarnivele, sed ne reciproke.)

Krome, Gagarin per siaj 108 enorbitaj minutoj donis al homoj, kiuj ne havis sciencan kleron, esperon pri la baldaŭ venonta “kosma erao”. Ĝi ne venis ĝis nun — sed tio estas alia afero, Gagarin ja ne kulpas.

Fine, Gagarin estis tre simpatia juna viro (fluginta en la kosmon estante nur 27-jara), kiun ĉiuj memoras bonkore ridetanta. Ankaŭ gravis, ke li naskiĝis en eta provinca vilaĝo, do estis vera “filo de la popolo”.

Sed samtempe, malgraŭ cinikeco de sekvaj vortoj, Gagarin estas, kaj, kredeble, estos same grava por nia historio, ĉar li ĝustatempe mortis (fakte — pereis). La morto ne estis ĝustatempe por liaj familianoj, sed por lia renomo — jes. Li restis legenda homo, heroo, kiun la popolo malmulte konas. Sendube oni scias sufiĉe multon pri lia



vivo — ekzemple, ke li, kiel unu el plej famaj vivantaj homoj, post la flugo multe vojaĝis tra la mondo, laboris en centro de kosmonaŭta pretigo, kaj krome estis deputito de la Supera Soveto de USSR ekde 1962. Ĉio estas sciata, sed ĉio ĉi estas jam en tre malproksima pasinteco. Se Gagarin vivus nun (kio estus tute reala, ja li havus nur 77 jarojn), li aŭ devus fariĝi senrezerva ermito, aŭ aktive partopreni socialpolitikan vivon. Ĉu li restus same amase respektata, se li rakontus pri siaj politikaj preferoj? Ĉu li estus sufiĉe riĉa por ne misuzi sian famecon, nome ne filmiĝi en reklamvideoj aŭ televidaj babilprogramoj? Ĉu ne suferus lia reputacio pro neeviteblaj aperigoj de fotoj aŭ fiartikoloj en skandala gazetararo sub mistitoloj: “Ŝokaj konfesoj de bonevino de Gagarin”?

La aŭtoro de ĉi tiu artikolo en oktobro 2010 ĉeestis renkontiĝon de junaj verkistoj kun Aleksej Leonov, la unua kosmonaŭto, kiu eniris “malferman kosmon” (laŭ Vikipedio, la ago nomiĝas “eksterveturila agado”, ĉar temas ankaŭ pri situacioj, kiam kosmonaŭtoj plene eliras el la kosmoŝipo — ekzemple, sur la lunan surfacon). Leonov, naskita samjare kun Gagarin, aspektis tute bone, entuziasme rakontis pri siaj “aventuroj” kaj vigle respondis demandojn. Sed estis klare videbla, ke sian rakonton li de jaroj scias parkere kaj demandoj ĉiam estas ŝablonaj (kvankam demandintoj

sincere kredis esti originalaj), do por li tio estas “bizneso”, rimedo de monĝajno. Ĉu Leonov estas riproĉinda pro tio? Tute ne. Sed ĉu imageblas Gagarin en tia situacio? Same ne...

Lige kun tio oni nepre menciui la filinojn de Gagarin, Jelena kaj Galina, kiuj, malgraŭ evidente bonstata vivo, neniam spekulis per nomo de sia patro. Jelena Gagarina aktuale estas ĝenerala direktoro de Kremlo (de ĝia historia parto, kiu inkluzivas kelkajn katedrojn kaj la faman muzeon “Armilejo”). Ŝia posteno estas alta, sed absolute eksterpolitika. Galina Gagarina estas docento en ekonomia universitato. Kaj Jelena, kaj Galina, sendube, estas ofte intervjuataj, sed estas klare videbla, ke ili ne intencas misuzi la nomon de Jurij Gagarin.

Por la legendeco de Gagarin kontribuas ankaŭ la cirkonstancoj de lia perejo aviadil-katastrofo la 27an de marto 1968. Ĝis nun oni ne scias precize, kio okazis. La oficiala versio tekstis, ke pro ŝanĝiĝo de fluga situacio la pilotoj (kune kun Gagarin pereis lia kolego Vladimir Serjogin) faris abruptan manovron kaj ne sukcesis rektigi la aviadilon. Ekzistis ankaŭ aliaj versioj. Laŭ unu el tiuj, kiujn faris sendependaj sciencaj profesiuloj, inkluzive de la menciita Leonov, la flugmaŝino de Gagarin estis aerpuŝita de alia aviadilo. Iuj akuzis altrangan armeanon Nikolaj Kuznecov, kiu pro malbona vetero devintus nuligi la flugon de Gagarin kaj Serjogin, sed ne faris tion. Kromaj versioj de la katastrofo, tre malverŝajnaj aŭ simple idiotaj, estas jenaj: la komploteca (Gagarin konflikte kun altranguloj kaj tiuj aranĝis la katastrofon), konspirologia (li mem imitis sian morton por plu vivi kun alia nomo) kaj eĉ nifologia (li ne pereis, sed estis forportita de aliplanedanoj).

La tutlanda funebro, anoncita pro la morto de Gagarin, estis la unua en la historio de USSR, kiu okazis ne pro la forpaso de aktuala ŝtatestro. Poste komenciĝis aktiva kultivado de la personeco de Gagarin — lian nomon ricevis pluregaj stratoj kaj placoj tra la lando kaj eĉ mondo, variaj instancoj, kosmaj objektoj kaj eĉ hokea trofeo! Sed, kiel jam dirite, oni ankaŭ nun ne akceptas tion negative. Jurij Gagarin estis la unua kosmonaŭto, kaj pioniroj kutime estas estimataj longan tempon.

**Grigorij Arosev**



## 11 reprezentantoj de UEA ĉe UN

Kadre de siaj oficialaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj UEA rajtas akrediti reprezentantojn ĉe la oficejoj de UN. Surbaze de la decido de la Estraro la Ĝenerala Direktoro liveris al la monda organizaĵo rajtigilojn por 11 reprezentantoj en la kalendara jaro 2011.

Ĉe la ĉefa sidejo de UN en Novjorko la ĉefreprezentanto de UEA estas Humphrey Tonkin. Aldonaj reprezentantoj estas Neil Blonstein, Thomas Eccardt kaj Scott Page. Blonstein krome laboras kiel volontulo en la Novjorka Oficejo de UEA. En Vieno la ĉefreprezentanto de la Asocio estas Hans Michael Maitzen, dum Gregor Hinker kaj Stella Maitzen estas aldonaj reprezentantoj. La estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj Stefano Keller estas la ĉefreprezentanto en la UN-oficejo en Ĝenevo, asistata de Charmian Common, Nicole Margot kaj Francesco Reale.

GK UEA

## Osmo Buller grave malsanas

La ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller, estis enhospitaligita la 11an de februaro. Antaŭ tio jam de kelkaj tagoj li malbone fartis kaj ne povis labori plentempe. Laŭ la peto de Buller oni ne publikigas detalojn pri lia malsaniĝo.

Komence oni antaŭvidis, ke li revenos al sia laboro iam en marto, sed laŭ freŝaj informoj, ricevataj el Roterdamo, lia sanstato ankoraŭ dum kelkaj semajnoj ne permesas eklaboron. Tial en la Centra Oficejo oni ne scias klare, ĉu li revenos antaŭ la estrarkunsido, okazonta en la mezo de aprilo.

Kvankam la ĉefa oficisto de la asocio forestas jam pli ol monaton, ĝis nun en la retejo aŭ gazetaraj komunikoj de UEA aperis nenia informo pri la temo. Nur en la diskutejo de la komitato la estraro kurte informis pri la afero, komence de la foresto.

(Laŭ *Libera Folio*)

## UNAM: Konferenco kaj kurso

3 mar 2011 en la Jura Fakultato de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM) okazis konferenco pri Internacia Lingvo Esperanto, en kiu parolis profesoro pri internacia juro Luis Córdova Arellano, prezidanto de Meksika Esperanto-Federacio Mallely Martínez, germana esperantisto Martin Schäffer, kaj biologino Eleonor Cortés.

Al pli ol cent gestudentoj ili rakontis pri la kreinto de Esperanto, L. L. Zamenhof, kaj — profitante la okazon paroli ĉe jura fakultato — pri Ivo Lapenna, elstara esperantisto kaj fakulo pri kompara juro. Mallely Martínez klarigis, kiel aliĝi al MEF kaj pri la graveco lerni Esperanton. Martin Schäffer parolis pri lingvaj problemoj kaj pri sia sperto en la Esperantomovado. Eleonor Cortés invitis studentojn aliĝi al kurso de Esperanto ĉe la Jura Fakultato de UNAM.

La kurso de Esperanto komenciĝis 5 mar 2011 kun 28 gestudentoj el diversaj fakoj kun Luis L. Córdova Arellano kiel la instruisto.

Luis Kordova Arejano

## SIA en Udmurtio

En la Nacia Biblioteko de Udmurtio (en la ĉefurbo Ijevsk) ekde 20 feb ĝis 2 mar 2011 funkciis ekspozicio dediĉita al la tradicia Semajno de Internacia Amikeco (SIA). En la ekspozicio estis prezentitaj libroj kaj periodaĵoj el la havaĵo de la biblioteko (*vd. la suban foton*).

En la kadro de SIA sperta instruisto Bronislav Ĉupin prelegis pri la Internacia Lingvo kaj Esperantomovado al lernantoj de la lernejo №9 kaj de la gimnazio №83. Inter la lernantoj anonciĝis kelkaj dezirantoj lerni Esperanton.

Bronislav Ĉupin



## Lingva Festivalo en Loveno

La Lingva Festivalo de Loveno (Belgio), kiu okazas en ĉiu nepara jaro, iom post iom ekiĝas klasikaĵo. 19 feb 2011, jam la trian fojon, la lovena klubo *Esperanto 3000* organizis ĝin en kunlaboro kun la Urbo Loveno. La Centro por Vivantaj Lingvoj ĉe la universitato de Loveno, estis nia gastiganto.

Nehazarde ĝi okazas en la Semajno de Internacia Amikeco. Ni ja kreas ligojn kun asocioj de malgrandaj aŭ minacataj lingvoj, kiel ekzemple la kurda kaj filipina asocioj en Loveno. En la paraj jaroj ni alimaniere festis tiun Semajnon, sed ekde 2012 tion transprenos la grupo en Kalmthout.

La temo por 2011 estis “Folkloro”. Dum la tuta posttagmezo, la ĉeestantoj povis elekti kvar sesiojn el oferto de dudek kvin prelegoj aŭ ekzercoj en vera lingvolaboratorio. La teman vortprovizon oni interplektis inter la paperaj informoj por la ĉeestantoj. Nova ĉi-jare estis akademia prelego de d-ro Barbara De Cock pri la uzado de la pronomoj “ni” kaj “nia” en specifa kunteksto, kun ekzemploj en la hispana, nederlanda kaj Esperanto.

Oni povis partopreni “labor-sesiojn” por ŝatantoj de la irlanda kaj de la hispana. Krom la eŭropaj lingvoj ankaŭ ĉi-foje kelkaj en Flandrio malpli konataj lingvoj estis proponataj, kiel la sinhala, la kurda kaj la filipina el Azio kaj la kongaj lingvoj ĉiluba, lingala kaj svahila.

Same kiel en antaŭaj Festivaloj, ampleksa ekspozicio estis vizitebla pri infanlibroj en ĉiaj eblaj lingvoj, pri libroj pri la temo folkloro kaj pri lingvaj verkoj ĝenerale. La promenejoj estis ornamitaj per informoj pri la prezentataj lingvoj. Por interesiĝantoj pri Esperanto ankaŭ sesio estis antaŭvidita kaj multaj lerno-libroj kaj aliaj verkoj estis ofertitaj.

Ankaŭ la Centro por Vivantaj Lingvoj prizorgis bone ekipitan informan standon kaj ofertis kvar sesiojn en sia lingvolaboratorio por interesiĝantoj pri la hispana, germana, japana kaj sveda.

Inter la sesioj restis sufiĉe da tempo por interparoladi kaj komenti pri la ĵus akirita sperto, kaj por iom forigi la soifon. Ĉi-foje eblis gustumi specialan bieron, ofertitan de *Esperanto 3000*.

La sekva festivalo en 2013 jam estas anoncata en la retejo. *Esperanto 3000* daŭre prilumos kaj protektos la kulturen diversecon de ĉiuj lingvoj de la mondo kaj vidos Esperanton facile lernebla pontolingvo inter la popoloj.

Ivo Schenkel

## La Civito de Paco ekkonstruita

Laŭ la projekto Amahoro, iniciatita de Societo Internacia por Paco Universala (SIPU, aliĝinta al la Pakto de la Esperanta Civito), 4 mar 2011 estis metita la unua ŝtono de la Civito de Paco en Njanzo, fare de Burundia ministro Jean Baptiste Gahimbare kaj de Giorgio Silfer, la Konsulo de la Esperanta Civito.

La solena ceremonio okazis parte sur la teritorio de Amahoro mem parte en aŭlo de loka hotelo, ambaŭkaze kun admirinda panoramo al la Tanganika lago. En la aŭlo de Njanzo kuniĝis pli ol cent personoj — plejparte esperantistoj el Burundio, Kongolando kaj Tanzanio.

Ĉe la tondo de la rubando, Giorgio Silfer dankis la ministrinon, la lokan deputitinon, la urbestron kaj la ceterajn aŭtoritatojn.

Unu tagon pli frue, la ministro pri bona regado de Burundio, Jean Baptiste Gahimbare, akceptis delegacion de la Esperanta Civito, konsistantan el Giorgio Silfer, Frederiko Nimubona kaj Marteno Mbazumutima, reprezentantoj de la paktinta establo SIPU. Dum tuta horo la ministro simpatie interparolis kun la delegacio pri la projekto, al kiu Burundia Respubliko disponigis 25 hektarojn. Ankaŭ la magistrato de Nyanza bonvenigis la delegacion de la Esperanta Civito.

**HeKo**

## AfrES: Triafoje en Afriko


9 kongolandoj kaj 12 burundianoj estis akceptitaj al la tria Afrika Esperantologia Semajno komence de marto en Buĵumburo. Dum ses horoj tage ili intensive studis precipe la historion kaj sociologion de la Esperanta popolo, sub la gvido de Giorgio Silfer.

La AfrES-anoj analizis kun la kursgvidanto problemojn kaj perspektivojn de la afrika Esperantio, interalie per roluludo, kie ili oficis kiel delegitoj ĉe la Forumo de la Esperanta Civito, en “eksterordinara afrika sesio”.

Ĉiu partoprenanto ricevis abundan tagmanĝon ĉiutage kaj senpage, kaj la eksterlandaj akurate aliĝintoj ricevis senpagajn tranoktojn en gastejo.

La tria Afrika Esperantologia Semajno estis organizita de Kultura Centro Esperantista (KCE), partnere al SIPU, kaj financita de sponsoroj kaj mecenatoj. La 8an de marto okazis lingvotesta sesio de KCE en kiu 21 personoj atingis la Civitan diplomon, per ekzamenado fare de Giorgio Silfer kaj Mushosi Birindwa.

**HeKo**



Bujumburo: Partoprenantoj de la 3a AfrES

## Bona rikolto en Havano

Pli ol 360 mil personoj vizitis en februaro la 20an Havanan Librofoiron, kie Kuba Esperanto-Asocio denove ekspoziciis Esperanto-librojn, aŭdigis muzikon kaj vaste informis pri Esperanto per disdono de pli ol tri mil informiloj.

La deĵorantoj ĉe la stando ricevis aliĝpeton de 283 personoj, plejparte junaj, kiuj eklermos la lingvon en pluraj kursoj en marto. Du kursoj komenciĝis jam en februaro kun pli ol 50 lernantoj; krome funkcias kursoj por progresantoj kaj instruantoj.

**Maritza Gutiérrez**

## Jubileo en Anhui

12 feb 2011 membroj de Anhui-a Esperanto-Asocio (AEA) kunvenis en la biblioteko de Hefei, la ĉefurbo de la provinco Anhui, por festi la 30-jariĝon de AEA. Ili retrorigardis la Esperantomovadon en la regiono.

Dum la pasintaj 30 jaroj AEA okazigis multe da Esperanto-kursoj en universitatoj kaj lernejoj kaj funkciigis radio-korespondan lernejon. Lokaj esperantistoj akceptis esperantistojn el pli ol 50 landoj. Pere de Esperanto oni komercis kun fremdlandaj komercistoj. AEA-anoj ĉiujare aranĝis turismajn vojaĝojn por fremdlandaj turistoj en Ĉinio. Danke al Esperanto multaj membroj de AEA vizitis eksterlandon.

Ĉiuj ĉeestantoj opiniis, ke AEA sukcese disvastigis Esperanton en la pasintaj 30 jaroj. Oni faris laborplanon por la venontaj jaroj kaj decidis eldoni libron omaĝe al la 30-jariĝo de AEA.

**ĈiĈ**

## Famaj vizitantoj en Jerusalemo

20–25 feb 2011 okazis la 25a Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo en la plej granda Jerusalema kongresejo *Bin-jane Hauma*. En la malfermo salutis la prezidento de Israelo Ŝimon Peres, la ministrino pri edukado Limor Livnat kaj la urbestro de Jerusalemo Nir Barkat. Partoprenis ankaŭ famaj israelaj verkistoj Meir Ŝalev kaj David Grosman.

Jam la trian fojon sinsekve Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) havis budon de Esperanto-libroj kaj revuoj. Inter la famaj vizitantoj estis la itala verkisto Umberto Eco, la israela verkisto A.B. Jehoŝua, kaj Salaj Meridor, eksa ĉefo de la Soĥnut kaj ambasadoro en Usono (onklo de lia patro, Emanuel Olsvanger, en la 1920aj jaroj fondis la Esperantomovadon en Jerusalemo).

Dum la foiro pli ol 40 dezirantoj aliĝis al la Esperanto-kurso baldaŭ malfermota en Jerusalemo, kaj centoj ricevis flugfoliojn pri Esperanto. Pluraj aĉetis la Esperanto-hebrean vortaron de Murĵan, kaj aliajn varojn. ELI ricevis oferton de la eldonejo *Minerva* pri luksa reeldono de la vortaroj de Murĵan, kaj pri vendado de Esperanto-libroj en ilia vendejo.

**Amri Wandel**



A. Wandel kaj A.B. Jehoŝua



Estas gaje lerni Esperanton kun Zsófia Kóródy en la Esperanto-urbo.

## Finna asocio jarkunvenis

La tradiciaj Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) okazis 12–13 mar 2011 en Tampere. La gastiganta societo *Antaŭen* festis sian 90-jaran datrevenon.

La historion de la jubileanta societo prezentis en vortoj kaj bildoj Jukka Laaksonen, kiu dum dudek jaroj estis prezidanto. Li kaj aliaj aktivuloj, la nuna prezidanto Tapani Aarne, Sylvia kaj Veli Hämäläinen kaj aliaj, bone faris la kunvenajn aranĝojn. Partoprenis 53 samideanoj.

La vespera programo regalis per parola, muzika kaj kviza amuzo. Inter aliaj, Anja Karkiainen remontris siajn poeziajn talentojn, kaj ruslanda klasikulo kvazaŭ renaskiĝis: Vladimir Vysocik en prezento de Andrej Teräväinen.

La jarkunveno de EAF reelektis Tuomon Grundström kiel prezidanton. Estraranoj estas Päivi Saarinen (vicprezidanto), Tiina Oittinen (sekretario), Paula Niinikorpi, Keith Uber, Markus Sunela kaj Jukka Nikoskelainen, vicaj Tiina Kosunen (kasistino), Börje Eriksson kaj Robert Bogenschneider. La estraro intergeneracia kaj internacia.

Dum la Tagoj aperis la unua ampleksa (150 paĝoj) Zamenhof-biografio en la finna lingvo, eldonita de la asocio. La agadplano difinas novan vortaron sekva granda eldona projekto.

**Tuomo Grundström**



## Herzberg: En tri lernejoj

Esperanto dum kelkaj jaroj estas instruata en la bazlernejo Nicolai, en la Esperanto-urbo Herzberg. Kadre de la trilanda Comenius-projekto, kiu finiĝis antaŭ unu jaro, instruis tie ĉefe Otto Kern kaj Zsófia Kóródy.

La direktoro de la lernejo Nicolai, s-ro Keller, transdonis specialan klasĉambrom por instruado de Esperanto kaj de la turka. La nova lingvoinstruistino Ewa Kukielba instruos tie la multnecian Esperanto-klason.

En marto Zsófia Kóródy komencis kelkjaran kurson de Esperanto por 20 lernantoj, kiuj devenas el multaj landoj, en la mezlernejo de Herzberg. Ŝi instruas la lingvon ankaŭ al malgranda grupo en la urba gimnazio, helpe de la lingvoinstruisto Christopher Koch.

**Petro Zilvar, Zsófia Kóródy,  
Harald Mantz**

## Du poŝtmarkoj el Slovenio

Okaze de la 20-jariĝo de la sendependiĝo de Slovenio, Fervoja Esperanto-Societo en Maribor aranĝis eldonon de du poŝtmarkoj. Kvankam la eldono estas privata, la uzado por la afranko ne estas limigita.

La figuro sur la markoj montras trajnon de granda rapido, kiu simbolas la deziron, ke fervojo fariĝu transporto plej uzebla, ĉar ĝi estas ekologie akceptebla.

Ĉar la eldono estas privata, la poŝto por presado kalkulis duoblan prezon. La prezo de kompleto estas 2,50 eŭroj. Mendu ĝin rete ([fes.maribor@amis.net](mailto:fes.maribor@amis.net)) aŭ poŝte (Esperanto, pp. 123, 9220 Lendava, Slovenio).

**Jovan Mirkovič**

## Ora sesio en la Esperanto-urbo

Belan jubileon, la 50an Studsesion, festis la 21 partoprenantoj en Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg (ICH) en la kleriga semajnfino 18–20 feb 2011.

Jen ĉapitroj el la interesa programo:

— Trarigardo de la faka laboro, prezentado de la biblioteko, kolektaĵo, ofertoj por studemuloj, staĝantoj (Peter Zilvar, Zsófia Kóródy);

— Principoj de faka tradukado, tradukekzercoj, diskutoj (Martin Brügge-meier);

— Didaktikaj ludoj por instruado, vigligo de kurs-horoj (Zsófia Kóródy);

— Uzi kantojn en la instruado — ŝancoj kaj riskoj (Johannes Mueller);

— Esperanto-literaturo, bibliotekoj, kulturo (Peter Zilvar).

Al la jubilea programo apartenis komuna vespermanĝo, babilado, rakontado pri personaj movadaj travivaĵoj, aŭskultado de pianomuziko de Johannes.

Sukcesa bilanco de la 12-jara kleriglaboro: multaj bonaj rezultoj, kapablaj trejnitaj, valora scienca, movada laboro.

**ICH**

## Trinivela Mediteranea Semajno

Pli ol okdek personoj el dek unu landoj kuniĝis en Agay, suda Francio, kie de 26 feb ĝis 5 mar disvolviĝis la tradicia Mediteranea Esperanto-Semajno.

Diversnivela grupo estis proponitaj. Komencantoj lernis kun Stano Marček (Slovakio), la duanivelan grupon gvidis Marek Blahuš (Ĉeĥio), kaj la trianivelan prizorgis Spomenka Štimec (Kroatio).

Kvankam la suno ne ĉiutage brilis, la semajno estis mirinda: la mimozoj florplenaj kaj la ruĝaj rokoj en la blua maro estas bona memoraĵo. Ekskurso en Grasse, la urbo de la parfumo, kontentigis ĉiujn. La lasta vespero tre gaje disvolviĝis kun poemoj, skeĉoj, kantoj, kaj dancoj danke al Josiane kaj Christian.

En regiona ĵurnalo aperis artikolo pri MES kun granda foto. La venontjara MES estos en alia loko ĉar la hotelo *Le Renouveau*, en kiu oni kutime semajnumis, estas vendota.

**Monique Prezioso**



## NASK: sama kurso en nova vesto!

La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) ŝanĝas la formaton de la 42a sesio en 2011!

Anstataŭ la trisemajna daŭro, NASK okazigos mallongan sesion de nur sep tagoj de intensa instruado dum la usona feria semajno de la 4a de julio (2–10 jul 2011).

Tiu ŝanĝo estas farita por allogi la lernantojn, kiuj ne havas sufiĉe da feria tempo aŭ mono por pli longa sesio. La loko — la sunplena kampuso de la Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD) — restas la sama. Ĉiu inter la aĝoj 16 kaj 96 (aŭ eĉ pli) de ĉie en la mondo estas bonvenaj!

Mallonga tempo kaj malmultekosta kursaro (kiu ne enkalkuliĝas kiel universitata studo) ebligas pli da libereco en la aranĝoj. Pro la lunda feria tago en Usono, la usonanoj devos foresti de la laborejo nur kvar tagojn (kvin por ne-usonanoj). Vi povas do alveni sabaton, la duan de julio, kaj foriri jam la dekan.

Partoprenantoj loĝos kvarope en apartamentoj kun individuaj dormĉambroj, kun tri manĝoj tage, en la apartamentejo “Internacia Domo”. La manĝejo kaj klasĉambroj situas apude. Oni povas profunde studi Esperanton kaj eĉ havi tempon partopreni la usonan feston de la Sendependec-Tago kun piroteknikaĵoj en la apuda urbeto La Jolla!

Birke Dockhorn el Germanujo, Bertilo Wennergren el Svedujo kaj Lee Miller el Usono planas divers-nivelajn formalajn klasojn ĉiutage kun kromaj programeroj en la posttagmezo kaj vespero. Hoss Firooznia, help-instruisto, gvidos ekskursojn kaj prizorgos la eksterlecionajn eventojn. Grant Goodall, profesoro en la Universitato de Kalifornio en San Diego kaj direktoro de ties lingva fakto, estos la kursaron. Estas jam la dua fojo por ĉi tiu teamo, kiu sukcese kuninstruis en 2008.

Ĉi-jare estas rabatita prezo por ĉiuj, kiuj aliĝis antaŭ la 15a de marto (865 USD), kaj estas aparta prezo por plentempaj studentoj kaj latinamerikanoj (665 USD), ĉio inkluzivita.

Pli da detaloj kaj fotoj troviĝas ĉe: <http://esperanto.org/nask>

Informoj pri prezoj kaj pagmanieroj: <http://esperantic.org/eo/edukado/nask>.

Por informoj pri registriĝo, stipendioj ktp., kontaktu la administranton, Ellen Eddy:

[eddyellen@aol.com](mailto:eddyellen@aol.com).

ESF

## Brazilo: Tri samtempaj kongresoj

San-Paŭlo invitas por grava triobla evento. Esperantistoj el la tuta Ameriko 9–14 jul kunsidos kun brazilanoj kaj junuloj en unu granda kongreso. Oni atendas pli ol kvincent kongresanojn.

San-Paŭlo estas unu el la plej mirindaj metropoloj en la mondo, riĉa kulture kaj turisme, kun multnombraj loĝebl-ecoj kaj bolanta komerca aktivado.

La temo de la 8a Tutamerika Kongreso de Esperanto estos “Procezoj de regiona integriĝo en la amerika kontinento: la rolo de Esperanto”.

*S. Paulo Convention Bureau*, institucio kiu faciligas okazigon de eventoj en la urbo, proponas sian apogon. Pere de ĝi, ankaŭ EMBRATUR, brazila turisma agentejo, jam helpas la kongreson. Ĉi tiu lasta publikigis la unuan afiŝon.

### Kontaktoj:

*Genildo Martins Coelho*

[Lkkeasp@gmail.com](mailto:Lkkeasp@gmail.com)

Skype: genildomcoelho

*Francisco S. Wechsler*

[take2011@fswechsler.org](mailto:take2011@fswechsler.org)

## Stokholmo invitas

En Stokholmo 13–15 maj 2011 okazos Sveda Esperanto-Kongreso.

La programo enhavos interesan prelegon de Katalin Kováts kaj mallongajn prelegojn de Konstantin Andreev kaj Megan Case. Estos tempo por diskuto pri temo de ideoj pri aktivecoj rilate al instruado de Esperanto. Krome estos pluraj jarkunvenoj.

<http://www.esperanto.se>

[sefkongr2011@esperanto.se](mailto:sefkongr2011@esperanto.se)

Ulla Luin

La 44a Konferenco de ILEI  
Kopenhago, 17-23 julio 2011

Post la neforgesbla semajno en Kubo, ILEI denove konferencos en Eŭropo. Ĉiujare alia kontinento: 2006 - Italio, 2007 - Japanio, 2008 - Benino, 2009 - Pollando, 2010 - Kubo, 2011 - Danio, 2012 - ni planas denove Azion. Pli da informoj: <http://www.ilei.info>

Kaj ĉiujare la tradicia programo: kleriga, kultura, scienca, organiza, turisma kaj ĉiujare io nova en la intima rondo de esperantistaj instruistoj

- simpozio kaj seminarioj
- prelegoj kaj paneldiskutoj
- ekskursoj kaj bankedo
- komitatkunsido
- lingva festivalo
- distraj vesperoj

Konferenca temo:  
**Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado**  
Simpozio: 22-23 julio

Alligilo kaj pliaj informoj:  
<http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php>  
[info@ilei.info](mailto:info@ilei.info)

## Unufraze

★ 18 mar estis inaŭgurita E-katedro en la Universitato de La Plata en Bonaero, Argentino. (Silvia Rottenberg)

★ Dum januaro k februaro ĉe la Universitato de Kostariko denove okazis oficiala E-kurso, kiu valoras tri kreditojn k validas por programoj celantaj la bakalaŭran gradon. (Hugo Mora Poltronieri)

★ En la Zaozhuang-a Universitato 89 studentoj aliĝis al la oficiala E-kurso en la dua semestro de la 2010–2011-a studjaro, kiun gvidas Semio, t. e. Sun Mingxiao. (ĈIIC)

★ Ramon Perera k Ramon Rius ekinstruis Eon je komenca nivelo en la Libera Universitato La Rimaia de Barcelono. (*Kataluna Esperantisto*)

★ Kruno Puškar, studento de la angla k germana lingvoj en la Zagreba universitato, prezentis 15 mar en la klubejo de universitataj lekciistoj en Zagrebo sian diplomlaboraĵon «Esperanto kiel (nova) Eŭropa “lingva franca”». (Spomenka Štimec)

★ La Ŝtata Administracio por Industrio k Komercio de Ĉinio akceptis la peton de Sun Mingxiao, aktiva e-isto de Zaozhuang, pri la marko “Esperantujo”, kiu estos uzata por 21 specoj de varoj. (ĈIIC)

★ E-libroj estis ekspoziciataj k vendataj 17-20 feb 2011 en la 12a Internacia Librofoiro en Vilno (Litovio), kiun vizitis pli ol 60 mil personoj. (Landa Agado)

★ La libro *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*, kompilita de Francesc Poblet i Feijoo k de Hèctor Alòs i Font, vekis grandan intereson en la kataluna socio; krom recenzoj en prestiĝaj amaskomunikiloj, okazis pluraj libro-prezentoj el kiuj elstaras tiuj en la Centro pri Nuntempa Kulturo en Valencio k en la Muzeo pri Historio de Katalunio en Barcelono. (*Kataluna Esperantisto*)

★ Je 18 mar 2011 al la 96a UK en Kopenhago aliĝis 1115 personoj el 60 landoj; plej multe el Francio 146, Germanio 125, Japanio 83, Danlando 76, Pollando 64, Nederlando 55, Brazilo k Ruslando po 47. (uea.org)

★ La Varsovia E-klubo kunlabore kun grupo de junaj muzulmaninoj okazigis 8 mar renkontiĝon pri la araba lingvo, pri la problemoj de identeco k sociaj demandoj en la arabaj landoj. (Landa Agado)

★ Fine de 2010 ĉesis aperi la interesa SAT-gazeto *Laŭte* pro longa restado en hospitalo de la redaktoro Kribo, t. e. Christian Baudé. (HeKo)

## Eŭropo senpova kaj malrapida

### Dafydd ab Iago el Bruselo

Lingvo gravas, sed grandaj katastrofoj, kiel la marta sismo kaj cunamo en Japanio, substrekas la bazon de ĉiu lingvo: vivo. Sen vivo ne estas lingvo. Pro tio, kiel esperantistoj, ni devas direkti niajn pensojn al Japanio, kaj ne nur niaj samideanoj.

Ĝuste en ĉi tiu tempo en Bruselo oni diskutas la sekurecon de atomfabrikoj en Eŭropo. Multe parolas la germano Günther Oettinger, respondeca pri energio en la Eŭropa Komisiono. Post la sismo en Japanio, kaŭzinta problemojn al nukleaj atomcentraloj, 15–16 mar Oettinger diskutis kun Eŭropaj ministroj kaj altnivelaj oficistoj respondecaj pri la uzo de nuklea energio. Li ankaŭ kunvenigis membrojn de la Eŭropa Parlamento, kiuj, ŝajne plejparte, subtenas pli da kompetenteco je Eŭropa nivelo por la Komisiono kaj ankaŭ por la Parlamento.

Oettinger promesas, ke Eŭropo interkonsentos ĝis junio pri novaj kriterioj por kontrolado de la 143 atomfabrikoj en la Eŭropa Unio. EU ankaŭ provos konvinki apudajn landojn — Ruslando, Turkio, Svislando kaj Ukrainio — interkonsenti pri novaj kriterioj por sekureco. Je la fino de la jaro Eŭropo devos fini la kontroladon de siaj atomfabrikoj.

Ĉu tio estas sufiĉa?

Kompreneble, la alta respondeculo de la Komisiono pri energio respondas



al la grandega timo de eŭropanoj. Li ankaŭ reagis rapide, proponante striktan kontroladon nur kelkajn tagojn post la katastrofo en Japanio. Bedaŭrinde, Oettinger ankaŭ devis konfesi, ke la Eŭropa Unio ne havas la povon haltigi atomcentralojn, kiuj ne kunformas al la sekurecnivelo starigita en EU. Efektive, la Eŭropa Komisiono ricevis nur “ĝeneralan subtenon” por kontrolado de atomcentraloj danke al la emocio kaj publika atento sekve de la katastrofo en Japanio. Sed la Eŭropaj parlamentanoj estas nur “konsultitaj pri atom-energiaj aferoj”. Sub la Traktado de Euratom, nur ŝtatoj-membroj havas la rajton decidi pri proponoj de la Komisiono. Plej ofte tio signifas, ke la reguloj ne estas faritaj por embarasi la ŝtatojn, eĉ se oni konscias pri la nepreco eviti nukleajn incidentojn. Pro tio la ŝtatoj-membroj, sed ne la

Eŭropa Komisiono, respondecas pri la kontrolado de atomcentraloj, kaj Eŭropo do ne povas decidi pri la fermado de malnovaj kaj malsekuraj atomcentraloj. Oettinger do emfazas, ke estus malprave konkludi rapide pri la sekureco de atomcentraloj en Eŭropo.

Tio estas la sama mesaĝo de pluraj, plejparte dekstraj, politikistoj en la Eŭropa Parlamento. La hispana parlamentano Alejo Vidal-Quadras, kiu estas ankaŭ profesoro pri nuklea fiziko, alvokas al la EU ne troigi en sia reago. “Ni devas eviti reduktajn kaj panikajn reagojn”, — li diris.

Tamen estas granda ŝanĝo en la menso de germanaj politikistoj en Bruselo. La konservativulino Angelika Niebler kaj la liberalulo Jorgo Chatzimakakis nun alvokas al plia kompetenteco por la Eŭropa Unio. Ili volas kundividitan respondecon inter la ŝtatoj-membroj kaj la Komisiono. Plie, Chatzimakakis nun alvokas por laŭplana fino de nuklea energio en Eŭropo.

Rebecca Harms el Germanio estas konsternigita pri la svaga koncepto de la kontrolado, proponita de la Eŭropa Komisiono. “Ĉiuj nukleaj reaktoroj devas esti submetitaj al rigoraj, sendependaj testoj por garantii la sekurecon”, — ŝi diris. Harms timas, ke estus preskaŭ nebla sekurigi la efikon de diversaj samtempaj mankoj kaj katastrofoj. Harms, germana verdulo, kompreneble alvokas la Eŭropan Union al decido ĉesigi la uzadon de atoma energio kaj koncentriĝi pri renovigeblaj energioj.

## Malĝustaj tradukoj

En la artikolo de Halina Gorecka *Omo, la lingvo de homo*, en la tri unuaj linioj de la unua kolumno de la p. 15, mi legis du interkrampajn tradukojn. La ĝustaj tradukoj nepre estas la sekvantaj:

- *vi portit* (vi estis portataj / vi estis portitaj);
- *zi portot* (ili estos portataj).

Efektive, al la aktiva pasinta verboformo, kiu estas dusenca (jen imperfekta, jen perfekta), ĉar Vengerov kopias Esperanton, nur tia sama duoble senca devas esti la respondaj pasivaj.

La du aperantaj kunmetitaj tradukesprimoj (vi estas portitaj / vi estas portotaj) neniam indikas agon, sed simplan staton, sed la ĝustaj pasivaj esprimoj ne nur esprimas agon, sed ankaŭ plene sinonimas al la respektivaj aktivaj.

Al tiuj viaj tradukoj respondas la sekvantaj aktivaj, kaj ne la respektivaj unuformaj, sed ili ne indikas agon, sed agan staton:

vi estas portintaj / vi estas portontaj

Kaj nur por konfirmi, ke mi atente legis, mi lamentas diri, ke vi ion mistradukas en la tria kolumno de la antaŭa paĝo:

— *Ti logas maplu, kam li* (Ci loĝas malpli ol li).

Geraldo Mattos

## Interesa kampo, sed senutila

Mi dankas Halinan pro la artikolo pri Vengerov kaj lia lingvo Omo en la decembra *Ondo*.

Halina skribis, ke li “... ripetis la kutimajn kritikojn al Esperanto ...” Kiaj estis tiuj kritikoj? Ŝajnis, ke liaj lingvaj principoj ege similis tiujn de Zamenhof.

Interesa la komento, ke vortoj bedaŭrinde submetiĝas al “historiismo” kaj perdas la originan signifon. Sed kion la pravortoj vere signifis? Se iam *bhratar* signifis “portisto”, povas esti, ke eĉ pli frue la vorto havis pli “praan” signifon. Alivorte, al ni posteuloj estas egale, kia estis la origina signifo, ni uzas la vortojn kaj donas al ili signifojn, kiuj nun utilas kaj ebligas interkomprenon. Interesa kampo, sed senutila por kreado de monda lingvo!

Trevor Steele

## Daŭrigu

Kvankam mi ricevis nur kelkajn numerojn de *La Ondo*, mi devas laŭdi vin pro diversaj informoj en ĝi. Estas io por ĉiu. Tio tre plaĉas al mi, ĉar mi longe laboris kiel ĵurnalistino kaj scias, kion tio signifas. Nur (vi) daŭrigu!

Bojana Alfirević



## Vikimediaj projektoj

Preskaŭ ĉiu aŭdis pri **Wikipedio** [<http://eo.wikipedia.org>], la libera interreta enciklopedio; multlingva kaj kunverkata de volontuloj el la tuta mondo, ĝi en la jaro 2011 fariĝas 10-jara. Ĝia Esperanto-versio atingis jam preskaŭ 150 mil artikolojn kaj oktobre okazos en Ĉeĥio la unua renkontiĝo de Esperantistaj vikipediistoj “Vikimano”. Sed ekzistas aliaj projektoj, bazitaj sur la vikia principo, membroj de la sama familio, sub tegmento de la fondaĵo Vikimedia (Wikimedia). Ili ne estas tiel grandaj, konataj kaj progresintaj kiel Wikipedio, tamen ili proponas utilajn informojn al la legantoj kaj samtempe inter ili serĉas volontulojn, kiuj helpus ilin antaŭenigi — do se vi trovos eraron aŭ mankon, ne hezitu klaki la butonon “Redakti”.



**Wikivortaro** [<http://eo.wiktionary.org>]

estas kunlabora projekto por krei liberan vortaron de vortoj en ĉiuj lingvoj. Ĝia Esperanto-versio kolektis ekde 2004 jam pli ol 10 mil vortarajn artikolojn — kun difinoj, gramatikaj informoj, elparolo, tradukoj kaj

eksteraj ligiloj.

**Wikifontaro** [<http://wikisource.org/wiki/Esperanto>] estas arĥivo de tekstoj disponeblaj laŭ libera permesilo, kiujn oni tie konservas senŝanĝe kaj povas ligi al ili el Wikipedia artikolo. Nuntempe ĉeestas ĉirkaŭ 500 tekstoj en Esperanto, i.a. kompletaj tekstoj de beletraĵoj kaj gravaj dokumentoj kiel la Manifesto de Raŭmo aŭ la traduko de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.



La Esperanta **Vikicitaro** [<http://eo.wikiquote.org>] estas kolekto de citaĵoj en Esperanto, aranĝitaj laŭ temo aŭ persono. Ĝi enhavas pli ol mil paĝojn, ekz-e: citaĵojn pri amo, pri Esperanto, kaj la tutan Zamenhofan proverbaron.

En **Vikilibroj** [<http://eo.wikibooks.org>] la uzantoj kunverkas instruajn tekstojn en Esperanto. Enestas ekzemple Manlibro pri tradukado, Kuirlibro, Francaj loknomoj, Kompendio pri blazonoj aŭ lingvokursetoj.

**Vikinovaĵoj** [<http://eo.wikinews.org>] estas klopodo pri libera ĵurnalismo, do loko por originalaj novaĵ-artikoloj tre facile reuzeblaj ĉie kaj de ĉiu (sufiĉas mencii la fonton). La Esperanta versio revigligiĝis antaŭ mallonga tempo.

**Vikiversitato** [<http://beta.wikiversity.org/wiki/Esperanto>] celas subteni komunan perretan lernadon kaj interŝanĝon de ideoj. Malsame de la aliaj projektoj, originalaj esploroj estas permesataj en ĝi. En decembro 2008, José Antonio Vergara kaj Marcos Cramer en la revuo *Esperanto* alvokis al faka Esperanto-agado tie.

**Vikispecioj** [<http://species.wikimedia.org/wiki/Esperanto>] estas malferma kolekto de informoj pri ĉiuj vivantaj specioj (plantoj, animaloj, ktp.). Ĝi enhavas jam pli 250 mil artikolojn. Pro fiksa strukturo kaj uzo de la latina terminologio ĝin ne necesis dividi en sendependajn lingvoversiojn.



**Wikimedia Komunejo** [<http://commons.wikimedia.org/?uselang=eo>] estas stokejo de atkvalitaj bildoj (sed ankaŭ videoj kaj sonoj), kiujn eblas laŭ simplaj kondiĉoj senpage reuzi — en Wikipedia artikolo, aŭ eĉ tute alie (ekzemple, en revuo). Nun tie situas jam preskaŭ 10 milionoj da dosieroj, inter ili pli ol 2000 en la kategorio Esperanto.

Finfine, por diskuti kaj lerni pri la Wikimediaj projektoj mem servas la **Meta-Wikipedio** [<http://meta.wikimedia.org/?uselang=eo>].

Marek Blahuš

## Ni povas helpi al Halina kaj Aleksander!

En la marta numero de *La Ondo de Esperanto* ĝia redaktoro Aleksander Korĵenkov informis pri grava problemo de sia edzino, fondinto de la revuo kaj elstara esperantistino Halina Gorecka: ŝi bezonas vivnecesan operacion kaj pro tio ili devas portempe transloĝiĝi (atendante la operacion) al Moskvo — unu el la plej multekostaj urboj de la mondo, ĉar nur tie oni povas fari tiujn operaciojn.

Dum dudeko da jaroj Halina kaj Aleksander estas “profesiaj esperantistoj” kaj ne havas aliajn enspezojn krom la ricevatajn pro sia eldona agado (verŝajne la plej nobla agado por la lingvo Esperanto).

Ni ĉiuj scias, kiom modestaj estas tiuj enspezoj, kaj ili certe ne sufiĉos por ilia nuna vivado en Moskvo kaj por grandegaj elspezoj, necesaj por tiu nesimpla operacio. Mi konas ilin ambaŭ jam dum jardekoj kaj scias, kiom memstaraj kaj netrudemaj ili estas, strebante nenuokaze zorgigi aliajn per siaj malfacilaĵoj. Ni — iliaj amikoj — sciis pri la problemo de Halina, sed ne sciis, kiom grava ĝi iĝis nun. Kaj se Aleksander sciigis nin pri ĝi, sekve iliaj propraj rimedoj vere estas ne sufiĉaj.

Sed **ni povas helpi** al Halina! Ĉi tie gravas ĝuste la vorto *povas* (anstataŭ ebla vorto “devas”), ĉar nia esperantista komunumo estas ne malmultnombra kaj per komunaj fortoj kapablas solvi multajn problemojn, ankaŭ vivhelpon por tiuj, kiuj senrezerve dediĉis sian vivon por nia kara afero, do — por ni mem.

Mi pretas sendi 50 mil rublojn (1250 eŭrojn) al ilia banka konto. Mi certas, ke Halina kaj Aleksander ne restos solaj fronte al sia malfeliĉo kaj ni kune venkos la problemon kaj plu, kiel ĝis nun, havos inter ni ilin — poresperantajn, aktivajn kaj sindonajn!

**Sergej Bronov**

prezidanto de Krasnojarska Esperantista Klubo  
esperantisto ek de la jaro 1974

## Ne malaprezu “virinajn” taskojn

Mi tre ĝojis legante la artikolon de Ed Borsboom pri Éva Farkas. Danke al ŝi mi lernis flue paroli kaj skribi Esperante. Ŝi gvidis someran kurson en Finnlando, kaj poste mi rajtis pasigi 1-2 semajnojn ĉe ŝi en Budapeŝto, kiam mi ekstudis en la Universitato Eötvös Loránd. Ŝi instruis al mi pli ol la universitato!

Tamen neniŭ pensu, ke dommastrino estas pli facila tasko ol lingvoinstruado. Ne malaprezu “virinajn” taskojn. Eduki infanojn, zorgi pri la mensa kaj korpa sanstato de la familio, pri la feliĉo de la edzo kaj la infanoj (kaj pri si mem) postulas vastan gamon da lertoj kaj scioj kaj denaske taŭgan karakteron. Kutime familioj (mal)sukcesas kaj eltenas pro la patrino/edzino.

**Raita Pyhälä** (Finnlando)

eksa dommastrino kaj lingvoinstruistino

15 feb 2011 forpasis en Neŭkeno, Argentina Patagonio

**Rodolfo Calogero (1923–2011)**

elstara aktivulo de la Argentina movado dum sepdeko da jaroj ekde sia esperantistiĝo en 1937, kunfondinto de Argentina E-Ligo, membro de UEA kaj SAT, Argentina peranto de UEA, patrono de TEJO kaj membro de Societo Zamenhof.

*Ni funebras kaj kondolencas.*

## Drondo: Paroliga kaj parolemiga

*De tempo al tempo, apud “sekaj” informoj pri esperantistaj renkontiĝoj, ni aperigas pli “lirikajn” tekstojn — tiaj estas la subaj impresoj de la juna brita aktivulo Tim Owen, unuafoje organizinta Drondon en Barlastono.*

La 7a Drondo (= diskut-rondo) okazis mezjanuare en Barlastono, sidejo de la Esperanto-Asocio de Britio. Mi antaŭe petis, ke ĉiu drondano kunportu *ikonan foton* pri kiu ili kapablos paroli. La celo estis meti la homojn en pozicion tian, ke ili ĉiuj povos kontribui kaj kiu donos al ili okazon antaŭprepari tion, kion ili intencos diri, prefere ol tuj komenci per peza temo kiu povus frakasi la memfidon de iuj en la ĉambro.

Glate pasis tiu temo ĉar ĉiu ja kapablis tre nature paroli pri sia foto. Aŭdiĝis plaĉaj rekonaj enspiroj kiam parolantoj montris famajn bildojn: Rosa Parks sidanta en sia loko en buso, la angla futbalteamo faranta la nazian salutogeston, Emily Davison petante voĉdonrajtojn por virinoj, la “falanta viro” de la Mondkomerca Centro, kaj foto de maldikega sudana infano forvelkante, dum atendeme rigardas ĝin vulturo...

Drondanoj ofte interrompis por komenti pri la foto de iu alia. La sesio montris sin lerniga ankaŭ, ĉar neniu havis eĉ etan suspekton, ke la angla futbalteamo iam salutogestis en la nazia stilo. Ja indos refari la taskon venonte, tiel bone ĉio pasis kaj tiel multaj ikonaj fotoj restas.



Per ĉi tiu foto Kevin Carter gajnis la premion Pulitzer en 1994. Du monatojn poste li mortigis sin, ĉu pro tio, ke li ne helpis la mortantan infanon?

### Sabato

La sabata mateno salutis la drondanojn per pli pezaj temoj. La tago komenciĝis per diskutado pri la aperonta sistemo en Britujo uzi *feliĉecon kiel mezurilon* por konsekvencoj de politika decido, sekve de la anonco de la brita ĉefministro David Cameron, ke, laŭ la sistemo lanĉita en Butano, ni britoj uzos feliĉecon por mezuri la efikon de registaraj agoj sur la homamaso brita. Ni tuŝetis temojn kromajn, ekzemple kial la kutiman mezurilon (Malneta Enlanda Produkto) oni povus konsideri netaŭga, kvankam estas ĝuste agnoski ke la priekonomika diskutado ne vere superis tedon.

Tiel ne estis por la venonta temo *korpo-modifigo*, kiu sekvis la kafaŭzon. Estis aparte plaĉe aŭdi la deinfanaĝajn memorojn de niaj okdekjarulinoj pri ilia kuraĝa junaĝo, dum kiu ili beligis la korpon per lipŝminko. Ni estas iel stranga grupo por pridiskuti tatuojn kaj similaĵojn pro tio, ke nur unu homo en la ĉambro havis oreloboron. (Tiu estis mi, kaj neniu en la ĉambro kapablis diveni kiom da boroj entute havas! Tio restas kvizo por alia tago!)

Estis domaĝe, ke Peter Redfarn ne venis, ĉar ĉi tiu temo ja estis lia propono. Bonsorte ĝi estas tiel ampleksa, ke ni eĉ ne tuŝis tiujn punktojn kiujn ili antaŭe sendis al mi kiel provizoran skeĉon, do mi antaŭĝuas refari la temon kun Peter ĉeestanta.

La lasta temo de la tago sekvis tiun ideon de la antaŭa vespero. Ĉi-foje anstataŭ fotojn mi petis, ke drondanoj venu kun *imponaj vortoj* kiuj donas kredon al la esprimo “bildo mil vortojn valoras”. La ideo enkapa kiun mi havis estis, ke la simpla esprimo “Mi havas revon” alportas al onia menso bildon de Martin Luther King paroladanta ĉe la Vaŝingtona Monumento. Ni ĉiuj scias pri kio temas la parolado, malgraŭ tio, ke la plejparto ne scias pri 99% de la tuta parolado.

Brile alfrontis la defion la drondanoj, spite de neantaŭvidebla problemo, ke tri el ili elektis la samajn vortojn de John F. Kennedy: “Ich bin ein Berliner”. Bonsorte mi kapablis dumsesie elpensi pliajn (inkluzive de zamenhofa!), helpita de kelkaj aliaj kiuj faris same, do ni sukcesigis viglan buntan paroladon.

### Dimanĉo

Similan formon sekvis dimanĉo, kiu komenciĝis per peza nuntempa temo kaj plifaciliĝis poste. Dum okazis la Wiki-leaks-skandalo ni pridiskutis la temon fajfilo-blovado, angla-lingvaĵo kiu signifas “raporti fare de iu ene de organizaĵo al la ekstera mondo pri siaj koncernoj rilate ĝin”. Mi dankemas pri la ĉeesto de Thomas Preece, unuafoja drondano kiu kapablis klarigi en flua Esperanto pri la skandalo.

La lasta sesio estis neatendita plezuro. La temo estis *miskomprenoj*, kaj mi antaŭe elektis ĝin por resti en la malplej longa tempoloko en la horaro, ĉar mi opiniis, ke homoj frontos malfacilaĵojn ĉi-rilate. Mi ne povintus pli malbone erari! Rapidajn ideojn oni sendis de unu flanko de la tablo al alia, ĉiuj havante rakontojn pri neintenca ofenda konduto en eksterlanda situacio pere de diversaj signifoj de mangestoj. Tio facile estis la plej plaĉa sesio, ĉar homoj de la aĝgamo de 21 al 86 babiladis, kvazaŭ ili estus kun longtempaj amikoj. Mi estis ege malfeliĉa kiam mi devis haltigi la viglan diskutadon (kiun mi ĉiuokaze jam permesis plilongiĝi) por la eĥosonosio.

Ho jes, tiu. Kiel la sesio pri miskomprenoj, ankaŭ ĝi estis plaĉa surprizo por mi, aparte pro la komento de Thomas, ke li atendis ion tedan sed ke li fakte eraris, kaj mi ege ĝojis aŭdi de la 83-jaraĝa Celia Mickle, ke ŝi ege ĝuis ĉion. (Tio estis ŝia unua fojo kaj ŝi ege nervoziĝis antaŭe, sed venigis ŝin ŝia amiko Hilda Jones, kiu estas kiel kutime brila partoprenanto.) Honeste mi ne estis tiel komforta, ĉar mi dum la tuta semajno sentis la mankon de la neanstataŭigebla David Kelso, malfeliĉe malaperinta en Italujo, kaj ke sen li mi ne povas imagi glatan Drondon. Vere mi havis bonan ŝancon, ke afablaj kaj decaj (kaj, plej grave, parolemaj) homoj decidis partopreni, kaj mi antaŭĝuas fari venontan.

### Tim Owen

La fama usona plakato “Rosie la nitistino” alvokis virinojn labori anstataŭ la militservantaj viroj.



# La povo de onidiroj

de Wolfgang Kirschstein

**P**oste oni nomis tiun tagon “la freneza merkredo”. Tiun senton absolute ne havis la loĝantoj en la vilaĝoj de la meza Jutlando la 29an de marto 1848. Alvoko estis distribuita ĉie kaj senprokraste: la loka vokto admonis ĉiujn virojn kolektiĝi subite je tagmezo.

Io estis tute ne en ordo. Amase ili kolektiĝis kaj, apenaŭ la vokto komencis rakonti al la asembleo pri la situacio, rajdisto aperis kaj anhele informis, ke ribeluloj konkeris la najbaran urbon, kaj ke jam forbrulis la tuta urbo. Iu aŭdis, ke okazis revolucio en la sudaj germanlingvaj duklandoj. Ĉiuj agaciĝis, kaj nur unu prudente demandis, ĉu vere li vidis la malamikon. Jes, la rajdisto konfirmis, fidindaj atestantoj efektive vidis la malamikon. Kaj kial dubi — ĉu eble li simpatiis kun la ribelo?

Provizore estis iom da dubo pri la identeco de la malamiko, sed iu diris, ke estis Kristiano Aŭgusto II, la duko de Aŭgustenburgo, kiu ribelis kontraŭ la dana reĝo. Vere, li jam en 1846 anoncis sian pretendon al la dana trono. Ne tute senkiale. En januaro 1848 mortis reĝo Kristiano VIII. La nova reĝo, lia filo Frederiko VII, havis jam 40 jarojn kaj du eksedzinojn, sed ankoraŭ ne sian propran filon, kiu heredu la tronon. La reguloj estis komplikaj: unu regularo valoris por la dana reĝlando, alia por la duklanda heredaĵo. Tial la pretendo de la duko ne estis tute prenita el malplena aero.

## Jen la problemo

La dana reĝo estis ankaŭ duko de Ŝlesvigo kaj Holstinio. La rilatoj inter Danlando kaj la duklandoj Ŝlesvigo, Holstinio kaj Laŭenburgo estas ege komplikaj kaj ne kontentige eksplikeblaj sur unu paĝo. Lordo Palmerston, iama angla ministro pri eksterlandaj aferoj, diris, ke nur tri personoj plene komprenis tiun rilaton: la unua mortis, la dua freneziĝis, kaj li, la tria, jam plene forgesis ĉion.

Vi nur memoru tiom:

La dana reĝo regis ankaŭ en tiuj duklandoj. Ŝlesvigo estis dana feŭdo, sed Holstinio germana. En Holstinio estis movado, kiu havis la romantikan ideon, ke la duklandoj estu “eterne nedividitaj” kaj ili prenis tiun sloganon el traktato el la jaro 1460. Ili opoziciis la strebon de la dana reĝo ligi Ŝlesvigon pli proksime al



Kristiano IX, la bopatro de Eŭropo, havis ses infanojn kaj plurajn nepojn, inter kiuj la Ruslanda imperiestro Nikolao II, la Brita reĝo George V, kaj aliaj monarĥoj.

la dana reĝlando; anstataŭe ili volis, ke kaj Ŝlesvigo kaj Holstinio, kiel teritorio kun germanlingva loĝantaro, proksimiĝu al la Germana Federacio.

Tiam estis tagoj de revolucio en Eŭropo. En februaro la francoj forpelis la reĝon, en marto la popolo levigis en Berlino, Vieno kaj Italio. Kial ne ankaŭ en la duklandoj?

La centro de la germanaj patriotoj estis en Kijlo. Tie disvastiĝis alia onidiro — la plebo en Kopenhago post manifestacio blokis la reĝon. Ili kredis, ke la reĝo Frederiko ne plu kapablis agi. Pro tio ili formis provizoran registaron. La arma ministro, la pli juna frato de la duko de Aŭgustenburgo — jes, tiu laŭdira ribelulo — per simpla truko la 24an de marto okupis la plej gravan garnizonon de la reĝo en la duklandoj. La plejmulto de la soldatoj aliĝis al la provizora registaro.

## La “ribelo” daŭras

En fabelo Andersen ilustras la povon de onidiroj: Unu plumo falis kaj kiam la kokinoj disvastigas la novaĵon finfine estas kvin kokinoj, kiuj mortis. Por la vilaĝanoj sendube estis pli ol unu plumo, sed tiutempe la komunikado ne estis kontentiga, kaj onidiroj kuris pli rapide ol oficialaj komunikoj.

Tre baldaŭ iuj konfirmis la suspekton: la duko de Aŭgustenburgo liberigis la plej harditajn krimulojn el la karcero de Rendsburgo. Ili minacis ĉiujn, kiuj ne aliĝis al la ribelo fare de la provizora registaro. Ili bruligis vilaĝojn kaj masakris la loĝantojn. En tiu situacio la vilaĝanoj organizis sin. Unue ili enfosis siajn plej valorajn havaĵojn, poste ili forĝis glavojn el plugiloj por fronti la malamikon. Kaj poste ili konstatis, ke estis nek malamiko, nek bruligitaj ruinoj, do la malamiko ne marodis en ilia regiono.

Dume la onidiro flugis pli norden. Fine tiu onidiro estis anstataŭigita de alia: la dragonoj el elita kazerno masakris ĉiun forkurintan rabiston, kaj tiel finiĝis la ribelo de la liberigitaj rabistoj — neniu mortis, nur iu ŝufaristo ne aŭdacis atendi la alvenon de la rabistoj kaj pendumis sin anticipe por eviti masakron.

## Post la unua Ŝlesviga milito

Dum 1848–1851 estis kelkaj bataloj pro Ŝlesvigo kaj Holstinio. Danlando fine regajnis la kontrolon de la duklandoj, nenio ŝanĝiĝis. La duko de Aŭgustenburgo estis ekzilita pro sia simpatio kun la provizora registaro. La Ruslanda imperiestro Nikolao I proponis jam en 1851 kandidaton por la dana trono kaj tiu fariĝis en 1863 reĝo Kristiano IX. Li estis konata kiel la “bopatro de Eŭropo”.

Unu el la pli unuaj agoj de Kristiano IX estis subskribi novan konstitucion, spite al konsiderindaj skrupuloj, ĉar tiu konstitucio inkluzivis Holstinion en la reĝlandon. Kristiano volis nepre eviti la antaŭvideblan konflikton kun Bismarcko, kaj vere li tuj trovis taŭgan pretekston por solvi la statuson de Ŝlesvigo. Danlando ankoraŭ rememoras ĉiujare tiun malvenkon de 1864. Pacan solvon kaj taŭgan landlimon inter Germanio kaj Danlando kreis nur plebiscito en la regiono post la Unua Mondmilito en 1920.

## Kial rakonti tion?

Hodiaŭ ni eble ridetas pri la eventoj ĉirkaŭ la freneza merkredo, sed ankaŭ hodiaŭ eblas plusendi onidirojn per sms. La interreto plusendas ajnan sen filtro kaj fine eble ekestos *Twitter*-revolucio.

La “freneza merkredo” estis plejparte kampanara agado kaj montris al la bienuloj ilian povon. Tial okazis almenaŭ parta liberigo de la kampanoj. La aŭtoritatoj en 1848 reagis plurloke senhelpe kaj la popolo ĉesis definitive kredi, ke la aŭtoritatoj scias, kion ili faras. Kaj tiu dubo persistas.

# Adam Smith pri la lingvo

Eseo de Bo Sandelin

Aleksandr Puŝkin klare montras la fakon de la famo de la skota filozofo Adam Smith (1723–1790) en sia vers-romano *Eŭgeno Onegin* (tradukis Valentin Melnikov):

sed legis li Adamon Smiton,  
kaj spertis pri ekonomik’ –  
do rezonadis kun efik’,  
kiel la ŝtat’ akiras monon,  
kaj kial ne necesas or’,  
se kontentigas manlabor’  
pri *simpła varo* la bezonon.

T.e., Smith estas konata kiel ekonomikisto. Sed, same kiel liaj filozofiaj samtempuloj, li havis vastajn interesojn, kaj la lingvo estis unu el tiuj. Eble legado de nur lia plej konata verko, *An Inquiry into the Nature and Causes of the Wealth of Nations* (1776), rezultus en dubo pri tiu aserto. En tiu libro li kritikis, ke supraĵa kono pri latino en la lernejoj estas konsiderata pli grava ol elementa kono pri geometrio kaj meĥaniko. Sed tie temas pri prioritatoj en baza edukado. Li mem volonte legis latinajn klasikulojn kaj spicis siajn prelegojn per latinaj esprimoj.

Kial Smith interesiĝis pri la lingvo? Serĉante la respon- don, ni ne povas preterlasi liajn spertojn de skoto. La lingvo ja



estas socia markilo, kaj la skota dialekto de la angla havis malaltan prestiĝon. Epizodo en *Select Society*, diskutforumo kreita de Smith kaj aliaj, montras kiel delikata la lingvo estis por la skotoj. Charles Townshend, angla politikisto kiu poste estis grava por Smith, estis invitita aŭskulti debaton en la societo. Post la fino, li sarkasme plendis, ke li ne komprenis la skotan dialekton: “Kial vi ne lernis paroli la anglan lingvon, same kiel vi jam lernis skribi ĝin?”

Tiu eldiro verŝajne rapidigis la fervoron de iuj skotaj intelektuloj paroli la “veran” anglan lingvon. Post kelkaj jaroj *Select Society* fondis specialan organizon kaj dungis instruiston el Londono, kiu lernigu la “korektan” anglan elparolon. Sed tio ankaŭ vundis la skotan memfidon.

Krom la skota kaŭzo, erudicia eŭropano tiutempe nepre devis koni plurajn lingvojn, i.a. la grekan kaj la latinan, por legi la esencan literaturon kaj esti ĝuste erudicia eŭropano. Listo pri libroj poseditaj de Smith montras, ke proksimume triono estis en la franca, triono en la latina, greka aŭ itala, kaj triono en la angla lingvo.

## La vortaro de Johnson

Frua frukto de la lingvointereso de Smith estis lia recenzo de *A Dictionary of the English Language* de Samuel Johnson. Tiu recenzo unue estis publikigita en la unua numero de *Edinburgh Review* en 1755. Poste ĝi estas republikigita kelkfoje, antaŭnelonge en *Essays on Philosophical Subjects*.

La vortaro de Johnson havis pli altan kvaliton kaj estis pli ampleksa ol la antaŭaj anglaj vortaroj. Tial ĝi havas gravan historian lokon. Smith laŭdas ĝin, sed estas tamen iom kritika. Temas precipe pri la dispozicio. Kiel sistemulo, Smith opinias ka la gramatiko devus direkti la dispozicion. Verkante longajn alternativajn artikolojn pri la vortoj *but* kaj *humour*, Smith montras kiel Johnson povus plibonigi la prezentadon.

Smith malkaŝas sin kiel ekonomikisto en la fino. Laŭdinte kaj rekomendinte la libron, li konkludas ke ĝia graveco fine dependas de ĝia uzado, t.e., li aplikas merkatan principon:

“Ĝia merito devas esti determinita de la ofteco laŭ kiu oni turnas sin al ĝi. Tio estas la plej korekta testo de ĝia valoro: kritiko povas esti falsa, privata prijuĝo sen-baza; sed se tia verko estas multe uzata, ĝi ricevis sankcion de la publika aprobo.”

*Edinburgh Review* estis revuo por recenzoj. «Ĝia motivo estis la skota soifo pri “mem-plibonigo”, kaj ĝi esprimis la kuriozan miksaĵon de nacia fiereco kaj sento de malsupereco (precipe koncerne la lingvon), kiu estis tiel karakteriza por la 18-jarcenta Skotlando», skribis John Bryce en la enkonduko de la represo de la recenzo. Ke Smith elektis recenzi ĝuste la vortaron de Johnson en la unua numero de la revuo, tial povas estis rigardata kiel parto de programo, li opinias.

## Retoriko kaj beletristiko

Kiam Smith en 1751 fariĝis profesoro pri logiko ĉe la universitato de Glasgovo, li lekciiis ankaŭ pri retoriko kaj beletristiko. Tio tre interesis lin, kaj li daŭrigis tion en la “privata” klaso, kiun li poste instruis fariĝinte profesoro pri moralfilozofio.

Bedaŭrinde, per helpo de du amikoj li bruligis siajn prelegnotojn tuj antaŭ sia morto, sed danke al retrovitaj notoj de du studentoj, la enhavo de 29 lekcionoj pri retoriko kaj beletristiko, kiujn Smith faris en 1762–1763, estas savitaj al la posteuloj. La unua triono temas pri la lingvo kaj ties evoluo. El ĉiuj aspektoj, kiujn li sisteme pritraktas, parte per ekzemploj de klasikaj aŭtoroj, ni elektu kelkajn fragmentojn.

Smith sin montras kiel lingva puristo. Li malŝatas, ke “bona angla vorto” kiel ekzemple *unfold* preskaŭ estis forpuŝita de la franca *develope*, ĉar la franca ne povis same bone transigi la enhavon al anglalingva leganto. Tamen, li rimarkigas ke fremda vorto post kelka tempo povas esti naturalizita kaj fariĝi same konata kaj uzebla kiel malnovaj anglaj vortoj.

La vortoj de la angla lingvo eble bezonas pli da zorgado ol tiuj de aliaj lingvoj, ĉar novaj vortoj “senĉese forpuŝas niajn proprajn originajn, tiel ke la provizo de niaj propraj nun fariĝis tre malgranda kaj ankoraŭ malgrandiĝas”. Ni rekonas la argumenton en la nuna debato, sed nun, inverse, temas pri penetro de anglaj vortoj en aliajn lingvojn.

La prelegoj №12–30 temas pri diversaj manieroj fari buŝan aŭ skriban prezentadon. Malsamaj reguloj direktu historiajn, poeziajn, panegirajn, sciencajn kaj jurajn prezentadojn. Oratoro aŭ verkisto celas aŭ prezenti nur kelkajn faktojn, aŭ konvinki iujn pri la vero de aserto. La lastenomita, konvinkiga kazo reprezentigas de du specoj de diskurso: la retorika kaj la didaktika.

La retorika diskurso ĉiel celas konvinki pri certa demando. Tial oni pligrandigas ĉiujn argumentojn por la partio, kiujn oni volas favori, kaj malgrandigas aŭ kaŝas la argumentojn por la kontraŭa partio.

La didaktika diskurso, kontraŭe, intencas korekte montri la argumentojn de ambaŭ partioj, laŭ Smith. Ĉiu argumento ricevas sian ĝustan pezon, kaj la celo ne estas konvinki pli ol la argumentoj mem kapablas.

Du metodoj estas uzataj en didaktika diskurso. Laŭ la unua, ni akceptas unu aŭ kelkajn fundamentajn principojn, kiuj jam estas konataj aŭ komence demonstritaj. Ili poste helpas nin klarigi diversajn fenomenojn. Smith nomas tiun metodon Newtona, kaj ĝi estas “sendube la pli filozofia kaj ... multe pli genia kaj tial pli engaĝanta ol la alia”. Ĝi helpas nin kompreni dependecojn inter diversaj okazaĵoj, kiuj alie ŝajnus neklarigeblaj. Smith poste mem uzas tiun metodon en *Wealth of Nations*.

La malpli bona dua didaktika metodo implicas, ke ni komence diras, ke ni klarigos certajn aferojn, kaj poste por ĉiu unuopa afero uzas klarigan principon, kiu povas esti aŭ unika aŭ uzita antaŭe. Tio estas nekohera metodo, kie “ĉio estas klarigita por si mem, sen ia referenco al io alia”. Smith atribuas ĝin al Aristotelo.

## La origino de la homa lingvo

La mallonga tria lekcionoj pri retoriko kaj beletristiko temis pri la origino kaj evoluo de lingvoj. Tiun temon Smith pli detale evoluigis en la eseo *Considerations Concerning the First Formation of Languages and the Different Genius of Original and Compounded Languages*, kiu unuafoje publikigis en *The Philological Miscellany* en 1761. La ideon pri la temo Smith verŝajne ricevis de pluraj fontoj: Rousseau, Girard, Mandeville.

“La demando pri la origino de lingvoj estas multe diskutita sed neniam plene solvita”, laŭ moderna enciklopedio. En

la 19a jarcento tiom da teorioj pri la temo floris, ke la influa *Société de Linguistique de Paris* en 1866 anatemis pluan diskuton. Nur en la 1990aj jaroj la temo revekiĝis, stimulita de progreso en esploroj pri la cerbo. La biologia evoluo de la homo fariĝis grava por kompreni la originon de la lingvo.

La homo de Smith, kontraŭe, estis anatomie preta de la komenco, kreita de Dio. Tial li povis limigi la analizon je la socia kaj kultura evoluo de biologie neŝanĝanta specio. Smith ne bezonis konsideri la evoluciteorion de Darwin jarcenton poste.

La analizo de Smith pri la origino de lingvo necese estas spekulativa aŭ dedukta el supozoj, ĉar mankas al li empiriaj komencaj faktoj. Dugald Stewart, la unua biografo de Smith, nomas la metodon de Smith *teoria historio* aŭ *konjekta historio*. Smith baziĝas sur “konataj principoj pri la homa naturo”, kiuj ebligas provizorajn konkludojn pri la proceso laŭ kiu la diversaj elementoj de lingvo aperis.

Precipe la unuaj partoj de la eseo povus esti nomataj “teoria historio”. Tie Smith pritraktas vortkategoriojn. Li opinias ke nepersonaj verboj kiel *pluit*, pluvas, verŝajne estis la unuaj vortoj. *Venit* povus signifi la tutan okazaĵon, kiam leono venas, kaj esti tiu vorto, kiun la timigitaj sovaĝuloj elkriis, kiam ili ekvidis tian beston. (La sovaĝuloj evidente parolis la latinan.) Pli malfrue en la evoluo de la lingvo, *venit* ne indikas, ke ĝuste leono venas. Tiam aldona vorto estis bezonata por montri tion, kio venas, ekzemple *venit ursus*, urso venas, aŭ *venit lupus*, lupo venas.

Kvankam Smith kredas, ke la unuaj vortoj estis verboj, li unue pritraktas substantivojn. Se renkontiĝas du sovaĝuloj, kiuj neniam lernis paroli kaj kiuj elkreskis en malsamaj lokoj, ili bezonas iel komuniĝi. Ili tiam eligas certajn sonojn, kiam ili volas indiki individuajn objektojn, ekzemple certan kavernon, certan arbon aŭ certan fonton. Poste, “kiam pli vasta sperto de tiuj sovaĝuloj igis ilin observi, kaj iliaj bezonoj devigis ilin mencii aliajn kavernojn kaj aliajn arbojn kaj aliajn fontojn, ili nature donus al ĉiu nova objekto la saman nomon, kiun ili al kutimiĝis uzi por tiu simila objekto, kiun ili unue konis”.

Smith montras al parenca fenomeno: Infano lernante paroli, nomas paĉo aŭ panjo ĉiun personon, kiu venas al la hejmo. Ĝi donas al ĉiuj viroj kaj virinoj la nomojn, kiujn ĝi lernis uzi por du individuoj. Do, laŭ Smith certa substantivo unue signifas ion individuan, sed poste estas pli vaste uzata por similaj aferoj.

Tamen, baldaŭ oni bezonis diferencigi inter individuaj objektoj en grupo. Tiel originis du aliaj specoj de vortoj, adjektivoj kaj prepozicioj. La adjektivo “*verda* esprimas certan kvaliton” kaj la vortoj “*verda arbo*, ekzemple, povus servi por distingi certan arbon de aliaj, kiuj estis velkintaj aŭ sensukiĝintaj”. Prepozicioj kiel *super* kaj *sub* indikas rilaton inter la objektoj.

Troviĝas ankaŭ alia principo por distingi aferojn unu de la alia: per sufiksoj. Smith nun prenas ekzemplojn de la formorica latino, kie rilatoj multe pli ol en la angla estas esprimataj per sufiksoj anstataŭ per prepozicioj kaj pronomoj.

## La evoluo de novaj lingvoj

Ŝanĝado kaj evoluo estis en la centro de la intereso de Smith, kiam temis pri la lingvo, la ekonomio aŭ io alia. Observinte la diferencon inter la angla kaj malnova lingvo kiel latino, li havas fundamenton por principa rezonado pri lingvoevoluo. Li konstatas ke la maljunaj lingvoj estis formoriĉaj

kun multaj deklinacioj kaj konjugacioj. Tial io, kio estas dirata per pluraj vortoj en juna lingvo, eble bezonus nur unu vorton en maljuna lingvo. “En latino *veni, venisti, venit* sufiĉe indikas, sen ia aldono, la okazaĵojn esprimatajn per la anglaj propozicioj *I came, you came, he* aŭ *it came*.”

La evoluo for de la formoriĉaj lingvoj komenciĝis, kiam homoj de malsamaj nacioj miksiĝis sekve de migrado aŭ militkonkero. Tiam tiuj, kiuj volis komprenigi sin, devis lerni la alian lingvon. Multaj homoj estis ekstreme konfuzitaj pro ties komplikaj deklinacioj kaj konjugacioj. Ili kompensis sian nescion pri la fleksiaj formoj per “ajna ŝanĝo, kiun la lingvo povus permesi al ili”. Anstataŭ uzi unu vorton kun certa fleksio, kiu donus certan signifon, ili povus uzi plurajn vortojn. “Lombardo, kiu volus diri ‘mi estas amata’, sed kiu ne memoris la vorton *amor*, nature penus anstataŭigi sian nescion dirante *ego sum amatus*.”

Poste Smith klarigas la diferencon inter maljuna lingvo kiel la greka, unu iom pli juna kiel latino, kaj aliaj eĉ pli junaj kiel la franca, la itala kaj la angla. La grekoj formis sian lingvon preskaŭ tute memstare, kaj kutimis krei novajn esprimojn el sia propra lingvomaterialo. “Tial la deklinacioj kaj konjugacioj de la greka estas multe pli komplikaj ol tiuj de iu ajn alia eŭropa lingvo, kiun mi konas”, Smith diras.

Latino estis miksaĵo de malnovaj toskanaj dialektoj kaj la greka. Ĉar komplika morfologio erodiĝas, kiam lingvoj renkontiĝas, la deklinacioj kaj konjugacioj de latino estis “multe malpli komplikaj ol tiuj de la greka”.

La franca, siavice, estis formita el latino kaj la lingvo de la frankoj, dum la itala originis el latino kaj la lingvo de la antikvaj lombardoj. Tial la morfologio de la franca kaj la itala estis eĉ pli simpla ol la morfologio de latino.

La angla, fine, estis kombino de malnovaj saksaj lingvoj kaj la franca, kiu enpenetris post la normanda okupo. La angla do havis eĉ pli simplan morfologion ol la franca, kaj kompensis tion per pli kompleksa sintakso, kie i.a. la vortordo estis grava.

Ĝenerale, “ju pli simpla iu lingvo estas en sia sintakso, des pli kompleksa ĝi devas esti en siaj deklinacioj kaj konjugacioj”, kaj inverse. Tiu principo ankoraŭ validas.

### Kion montras la lingvoanalizo de Smith?

Ni supre resumis la esencon de la verkado pri lingvoj de Smith. Kiom ĝi koincidas aŭ malkoincidas kun la nuna opinio eble ne tre gravas. Interese estas, ke ni ĉi tie havas unu el la fontoj pri la ĝenerala sinteno al scienco de Smith.

Unue, liaj lekcionoj kaj i.a. *Considerations Concerning the First Formation of Languages* montras, ke liaj sciencaj interesoj estis vastaj kaj etendiĝis ekster la ekonomiko, pro kiu li estas ĉefe konata. Tia vasteco karakterizis multajn el la tiutempaj sciencistoj.

Due, same kiel en lia ekonomika verkado, ŝanĝado kaj evoluo estas en la fokuso (tamen ne koncerne la anatomian evoluon de la homo, kiu estis nekonata).

Trie, Smith donas ekzemplon de diversaj metodoj laŭ la cirkonstancoj. La origino de la lingvo estas analizata ĉefe per dedukto el supozoj pri la homa konduto, dum lia analizo pri la diferenco inter lingvoj havas ankaŭ induktajn elementojn.

Kvare, same kiel en *Wealth of Nations*, li pensas laŭ la modelo de tuta sistemo, kie diversaj aferoj dependas unu de la alia. Ekzemple estas dependeco inter la morfologio kaj la sintakso de lingvo, tiel ke kompleksa sintakso kompensas malriĉan morfologion, kaj inverse.



## Quo vadis. Esperanto-lingvistiko?

de Ryszard Rokicki

Estas konate, ke Zamenhof avertis movadanojn kontraŭ la opinioj de lingvistoj. Malgraŭ tio, apliko de lingvistiko al Esperanto vekas kutime pozitivajn emociojn.

Ĝenerale, rezultoj de lingvistikaj studoj estas interesaj krom por lingvosciencistoj mem, ankaŭ por etnolingvanoj en la sferoj de **lingva korekteco** kaj **lingva instruado**. Ŝajnas, ke multaj profesiaj lingvistoj ne rifuzas priskribi gramatikon por didaktikaj kaj lingvo-perfektigaj celoj, malgraŭ ke tiu priskribo estas io tute alia, ol priskribo de lingvo por sciencaj celoj.

Lingvistikaj diskutoj inter esperantologoj kutime estas pens-stimulaj, foje tamen impresas iom kurioze. Ekzemple konata usona lingvisto, Ken Miner en sia *Noto pri la recenzo de Alen Kris*<sup>1</sup> prezentas erudicie faktojn pri la terminaro uzata de lingvistoj kaj konstatas tute prave, ke la terminoj uzataj en PMEG ne estas tio, «kio nomiĝas en la lingvistika literaturo “tradicia gramatiko”»<sup>2</sup>. Per la konstato, ke ili estas maltradiciaj, la artikolo lerte sugestas, ke ili estas modernaj, t. e. iel konformaj al la hodiaŭa lingvistiko. Tiunmaniere ĝi kredigas al lingvistike nesperta leganto, ke la kritikaj rimarkoj de Alen Kris estas tute vanaj kaj eble eĉ ne intencitaj de li mem! Se mi ne konsiderus tiun artikolon nur kiel admonan kaj trukan ŝercon lingvistan, mi spite demandus: Kial tiuj “modernaj” terminoj estas troveblaj nur en PMEG kaj ĝin koncernaj artikoloj kaj ne estas uzataj de la profesoro mem en la liaj?

Lingvistiko estas unu el tiuj sciencoj, kie oni povas relative senkonsekvence erari aŭ misvoĵi. Tio ne okazas al pianisto, ĉar la aŭskultantoj kun “bona orelo” tuj kaptos la misinterpretojn, nek al inĝeniero, por ne paroli pri kuracisto. Kompreneble, ĉiu iam eraras, sed la pezo de la konsekvencoj por lingvistoj ne estas sama, kiel ĉe multaj aliaj fakuloj. Kiel

“Quo vadis, Esperanto-lingvistiko?” estas la unua ero en la triartikola ciklo de Ryszard Rokicki. En la venontaj kajeroj de *La Ondo de Esperanto* aperos pliaj tekstoj: “Mia apliko de lingvistiko al Esperanto” kaj “Plurformismo en Esperanto”. Komentoj estas bonvenaj.

ni ĉiuj spertas, Esperanto vivas kaj evoluas sendepende, ĉu ĝi estis priskribata de la FdE, de PAG, aŭ de PMEG, sendepende, ĉu esperantologoj-gramatikistoj apogas la teorion pri inversa vortefiko aŭ pri la gramatika karaktero de Esperantaj radikoj, aŭ negas ilin. Ĉu ni sekvos novajn teoriojn, aŭ ne, la lingvo mallamos plu en sian pli-malpli brilan estontecon.

Ĉu nia lingva komunumo bezonas lingvistikajn studojn pri Esperanto? Ĉu nur kelkaj lingvistike interesitaj esperantologoj-hobiuloj bezonas havi publikon por siaj prezentoj?

Iom amare impresas la konstato de Detlev Blanke, ke ... “en la esperantista komunumo la intereso pri aktiva scienca laboro estas subevoluinta. Tio validas ne nur por interlingvistiko kaj esperantologio, sed ankaŭ por la faka apliko ĝenerale”.<sup>3</sup> Iom poste, en la sama artikolo venas pli esperiga vortumo: “Brilaj esceptoj tamen ekzistas”.

Lingvistikaj priskriboj estas kutime malfacile kompreneblaj por lingvistike nespertaj legantoj. La faka terminologio estas ne nur komplika en si mem, sed ĝi ankaŭ varias de skolo al skolo, kio faras por multaj esperantistoj la lingvistikan aliron des pli malalloga. Kutime priskribo de la lingvo konsistas el du partoj: **leksiko** (kie troviĝas la lingvoelementoj) kaj **gramatiko** (reguloj krei el la lingvoelementoj tekstojn). Ekzistas diversaj manieroj prezenti, kiel el la en leksikon amasigitaj lingvoelementoj oni povas konstrui tekstojn. Ili varias ankaŭ laŭ celoj atingotaj.

Priskribante lingvon, ekzemple, por kompari ties gramatikon kun alia(j) lingvo(j) priskribita(j) de siaj samfakaj kolegoj, oni aplikos alian manieron ol por priskribi la lingvon por didaktikaj celoj (verkante gramatikajn klarigojn por lernolibro de koncerna lingvo). Tute alie aspektos la lingvopriskribo, se la lingvisto deziras elprovi iun novan lingvopriskriban teorion aplikante ĝin al la lingvo Esperanto<sup>4</sup>.

Ĉiu priskribo de la lingvo estos ĝusta en sia kategorio kondiĉe, ke ĝi estas laŭeble (maksimume) **senkontraŭdira, senerrara kaj tuteca**, t. e. plene kovranta la lingvan materialon — pritraktanta ĉiujn lingvajn fenomenojn, kiujn ĝi celis priskribi. Ĝi tamen, eĉ se maksimuma sur ĉiu kampo, ne estos facile aplikebla por celoj aliaj ol la difinitaj de la priskribanto antaŭe. Alikaze povas okazi profundaj koliziaj miskomprenoj. Ekzemple, Alen Kris sentis sin duonidiot<sup>5</sup> legante PMEG — ŝajnas tute malprave, ĉar ĝi estis verkita ne por legantoj kiel li; ja multaj aliaj ĝuas la manlibron kaj alte aprezas la priskribojn de la aŭtoro!

En Esperanto-lingvistiko (ankaŭ en la ĝenerala lingvistiko) foje okazas, ke la medio interesiĝas ne tiom, ĉu la lanĉata teorio estas prava kaj vera, kiom pri tio, **kiu aŭtoras ĝin**. Se oni nur ekscios, ke difinitan tezon prezentis aŭtoritatulo, oni facile akceptas ĝin kaj kundeklaras ĝin vera kaj prava. Se la teorio venas de iu, kiu ne ĝuas aŭtoritatecon en la medio, oni inklinas trakti ĝin kun rezervo aŭ pretertraktas ĝin sen enprofundiĝi en la enhavon, — tiun sorton spertis, interalie, la ideoj de Sándor Révész<sup>6</sup>. Rigardante la jarcentan diskutadon pri la gramatika karaktero de la radikoj ni povas rimarki, ke, ekzemple, la PAG-aŭtoroj subtenas siajn teoriojn per la aŭtoritateco de Ferdinand de Saussure, kies frato donis fundamenton por la teorio pri la gramatika karaktero de la Esperantaj radikoj. István Szerdahelyi, kontraŭante la PAG-teoriojn, argumentis, interalie, per la aŭtoritateco de Pierre Janton kaj de la sovetia lingvisto Viktor Grigorjev. Michel Duc Goninaz analizante la problemon<sup>7</sup> citas apoge, interalie, István Szerdahelyi, ktp. Iel okazas, ke ni tro ofte emas sekvi preferatajn aŭtoritatulojn ol mem **studi kaj poste konkludi**.

Malgraŭ ĉio ĉi, estas nekontesteble, ke lingvistikaj esploroj de Esperanto estas necesaj por la Esperanto-Movado. Apliko de lingvistiko al Esperanto havas almenaŭ du ĉefajn celojn. Unuavice montri, ke en la Movado ekzistas fakuloj, kiuj **kapablas moviĝi en la scienca lingvistika** medio kaj povas esti traktataj kiel seriozaj partneroj en sciencaj debatoj. Duavice, per objektivaj studoj pri diversaj lingvaj fenomenoj, **praktike helpi al instruistoj**, lernolibraj, gramatikaj kaj vortaraj aŭtoroj kaj ankaŭ **lingvokonsciaj esperantistoj**, kiuj deziras pliperfektigi siajn lingvokonon kaj lingvosenton.

Esperantologio devas ankaŭ disponi pri sciaro kaj argumentoj, kiuj ebligas reagi adekvate, t. e. **konforme al la interna sistemo** de Esperanto kaj la realaj komunikaj bezonoj al proponoj pri lingva evoluo (aŭ eĉ ŝanĝoj) ĉe individuaj esperantistoj.

En la lastaj jaroj netrotakseblan rolon sur tiu kampo plenumas la retejo pri esperantologio *Lingva Kritiko* (<http://lingvakritiko.com>), prizorgata ekde kelkaj jaroj de Bertilo Wennergren kaj kelkaj invititaj esperantologoj. Interesaj kaj pens-stimulaj estas ne nur la artikoloj mem, sed ankaŭ la komentoj, skribataj jen de fakuloj, jen de amatoroj.

### Referencoj kaj notoj

1. Temas pri kritika recenzo de PMEG fare de Alen Kris en *La Ondo de Esperanto*, 2006, №11.

2. Miner, Ken. *Noto pri la recenzo de Alen Kris* (<http://lingvakritiko.com/2008/12/12/noto-pri-la-recenzo-de-alan-kris/>)

3. Blanke, Detlev. *Interlingvistiko kaj esperantologio, ĉu vere necesaj?* // *La Ondo de Esperanto*, 2006, №4–5.

4. Tiel procedas, ekzemple, Ken Miner en sia *Croft-Modelo por la Esperanta Radiko-kategorienco*, adaptante al Esperanta priskribo la funkcio-gramatikan modelon de William Croft: [http://www.sunflower.com/~miner/CROFT\\_package/croft.html](http://www.sunflower.com/~miner/CROFT_package/croft.html)

5. “Pasas pli ol duoncento da similaj glosoj, kiuj faras iom demencan impreson. Aŭ la aŭtoro petole ŝercas, aŭ Pacienca Leganto (kaj mi samkompanie) estas rigardataj kiel duonidiot(j), ĉe kiu(j) mankas plej elementaj konceptoj (Alen Kris. *Amaraj provoj* // *La Ondo de Esperanto*, 2006, №11).

6. Révész, Sándor. *Radikkarakteroj kaj elementaj vort-strukturoj* // *Acta Interlinguistica*. Varsovio, 1982.

7. Duc Goninaz, Michel. *Szerdahelyi kaj la “gramatika karaktero de la radikoj”* // *Abunda fonto*. Poznań, 2009.

---

## Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj

La Universitato Adam Mickiewicz en Poznań, ofertas tri-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko, kiu funkcias dum pli ol dek jaroj. La internacia kursaro okazas en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de d-rino Ilona Koutny, membro de la Akademio de Esperanto.

Inter la prelegantoj estas elstaraj esperantologoj, kiel profesoroj Humphrey Tonkin, John Wells, Aleksander Melnikov, kaj Michel Duc Goninaz; doktoroj Věra Barandovská-Frank, Detlev Blanke, Katalin Kováts, Zbigniew Galor kaj Blazio Wacha; la poetino Lidia Ligeza, ekspertoj de sia tereno kiel Maria Majerczak, Tomasz Chmielik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Michael Farris kaj Bradio Moro.


✉ al. Niepodległości 4, PL 61-874 Poznań, Pollando  
✉ [ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl)



# La viro kiu vivis por aliaj

*Novelo de Jerome K. Jerome*

Muntaĵo de Serge Sire



Kiam ni unue renkontiĝis por paroli, li sidis kun sia dorso kontraŭ tondita saliko, fumante argilan pipon. Li fumis ĝin tre malrapide sed tre skrupule. Post ĉiu enspiro li forprenis la pipon de sia buŝo kaj svingis sian ĉapon por forblovi la fumon.

“Ĉu malagrablas?” mi demandis de malantaŭ arbo, samtempe pretigante min por forkuri, pro tio ke la respondoj de knabegoj al la demandoj de knabetoj estas kutime tiaj, ke oni evitu ilin.

Je mia surprizo kaj trankviliĝo — ĉar reregardante mi perceptis ke mi antaŭe subtaksis la longon de liaj kruroj — li ŝajnis konsideri la demandon natura kaj taŭga, respondante kun senafekta sincero: “Ankoraŭ ne.”

Mi ekdeziris komfortigi lin — sinteno kiun li ŝajnis kompreni kaj ŝati. Elirante subĉielon, mi sidiĝis kontraŭ li kaj rigardis lin dum kelka tempo en silento. Tiam li diris:

“Ĉu vi iam provis trinki bieron?”

Mi konfesis, ke ne.

“Ho, ĝi estas aĉaĵo”, li respondis kun senintenca tremo.

Forgesante aktualajn ĝenaĵojn pro malĝoja rememoro de la pasinteco, li plu fumis sian pipon senzorge kaj senpense.

“Ĉu vi ofte trinkas ĝin?” mi demandis.

“Jes”, li respondis malgaje; “ni ĉiuj uloj en la kvina klaso trinkas bieron kaj fumas pipojn.”

Pli profunda nuanco de verdo eksternis sin sur lian vizaĝon.

Li subite ekstaris kaj ekiris al la heĝo. Antaŭ ol li atingis ĝin, li tamen haltis kaj parolis al mi, sed ne turnante sin reen.

“Se vi sekvos min, knabeto, aŭ rigardos, mi batos vian kapon”, li diris rapide kaj malaperis kun ŝpruca sono.

Li foriris je la fino de la jarduono, kaj mi ne revidis lin ĝis ni ambaŭ estis junaj viroj. Iam poste mi okaze renkontis lin sur Oksfordostrato, kaj li invitis min veni kaj pasigi kelkajn tagojn kun liaj parencoj en Surio.

Mi trovis lin pala kaj malfeliĉa, kaj de tempo al tempo li vespiris. Promenante trans la parko li pligajiĝis multe, sed tuj kiam ni revenis al la domopordo li ŝajnis reordigi sin, kaj li komencis vespiri denove. Li manĝis nenian ajn vespermanĝon, nur gustumante glason da vino kaj diserigante pecon da pano. Rimarkante tion mi ekzorgis, sed liaj

parencoj — fraŭlina onklino, kiu mastrumis la domon, du pli aĝaj fratinoj, kaj miopa kuzino kiu forlasis sian edzon en Hindujo — estis evidente ĉarmitaj. Ili rigardetis unu al la alia kaj kapjesis kaj ridetis. Unu fojon, perdita en pensado, li glutis pecon da pankrusto, kaj tuj ili ĉiuj aspektis doloritaj kaj surprizitaj.

En la salono, dum distra sentimentala kanto fare de la kuzino, mi kaŝe pridemandis lian onklinon pri la afero.

“Kio misas pri li?” mi diris. “Ĉu li malsanas?”

La maljunulino ridis mallaŭte.

“Unu tagon vi estos tia”, ŝi flustris gaje.

“Kiam?” mi demandis, ne multe timigita.

“Kiam vi enamiĝos”, ŝi respondis.

“Ĉu li enamiĝis?” mi demandis post paŭzo.

“Ĉu vi ne povas vidi, ke jes?” ŝi respondis iom mal-estime.

Mi estis juna viro, kaj la afero interesis min.

“Ĉu li neniam vespermanĝos ĝis li renormaliĝos?” mi demandis.

Ŝi turnis sin akre al mi, sed verŝajne decidis ke mi estas nur stulta.

“Vi atendu ĝis via tempo venos”, ŝi respondis, skuante siajn buklojn kontraŭ mi. “Via vespermanĝo ne gravos al vi — se vi vere enamiĝos.”

En la nokto, ĉirkaŭ duono post la dek-unua, mi ŝajnis aŭdi paŝojn en la koridoro, kaj ŝtelirante al la pordo kaj malfermante ĝin, mi vidis la figuron de mia amiko en tualeta robo kaj pantofloj iri suben laŭ la ŝtuparo. Mi eksupozis, ke lia cerbo kripla pro problemoj kaŭzis al li somnambulajn tendencojn. Parte pro scivolo, parte por prizorgi lin, mi surmetis pantalonon kaj sekvis lin.

Li metis sian kandelon sur la kuirejan tablon kaj iris rekte al la manĝoŝranko, de kie li poste revenis kun du funtoj da malvarma bovaĵo sur telero kaj ĉirkaŭ litro da biero en kruĉo; kaj mi foriris, dum li ekprenis vinagritajn kukumojn.

Mi helpis dum lia geedziĝa ceremonio, kie ŝajnas ke li penis montri pli multan ekstazon ol iu ajn homo kapablas senti; kaj dek kvin monatojn poste, hazarde rimarkinte anoncon en la naskorubriko de *Tempo*, revenante hejmen el la urbocentro mi vizitis lin por gratuli lin. Li paŝis tien kaj reen laŭ la koridoro kun sia ĉapelo surmetita, paŭzante



intermite por gustumi malallogan pladon da malvarma tranĉaĵo de ŝafaĵo kaj glason da limonado, kiuj restis sur seĝo. Rimarkinte ke la kuiristo kaj ĉambristino vagas en la domo evidente enuantaĵoj pro manko de farenaĵoj, kaj ke la manĝoĉambro, kie li malpli obstrukus, estas malplena kaj bonorda, mi unue ne povis kompreni la motivon por lia intenco elekto de malkomforto. Mi tamen retenis miajn pensojn kaj demandis pri la patrino kaj bebo.

“Ne povus esti pli bone”, li respondis kun vea ĝemo. “La kuracisto diris, ke li neniam spertis pli kontentigan kazon.”

“Ho, mi ĝojas aŭdi tion”, mi respondis. “Mi timis, ke vi estas zorgigita.”

“Zorgigita!” li kriis. “Mia kara ulo, mi ne scias, ĉu mi staras sur mia kapo aŭ miaj piedoj” (li ja donis tian impreson). “Ĉi tio estas la unua manĝero kiu pasis tra miaj lipoj dum dudek kvar horoj.”

Tiumomente aperis flegistino je la supro de la ŝtuparo. Li alkuris al ŝi, renversante la limonadon pro sia ekscito.

“Kio okazas?” li demandis raŭke. “Ĉu ĉio en ordo?”

La maljunulino rigardis lin kaj lian malvarman kotleton, kaj ridetis aprobe.

“Ili fartas bonege”, ŝi respondis, karesante lian ŝultron patrinece. “Ne zorgu.”

“Mi ne povas trankviliĝi, sinjorino Ĵobsono”, li respondis, sidiĝante sur la fundan ŝtupon kaj apogante sian kapon kontraŭ la balustrado.

“Kompreneble vi ne povas”, sinjorino Ĵobsono diris kun admiro; “kaj vi ne estus taŭga viro se vi povus.” Tiam mi ekkomprenis kial li portis sian ĉapelon kaj manĝis malvarmajn kotletojn en la koridoro.

La sekvan someron ili luis belan malnovan domon en Berkŝiro kaj invitis min viziti de sabato ĝis lundo. Ilia loko estis proksima al la rivero, do mi pakis flanelan kompleton en mian valizon, kaj dimanĉan matenon mi venis mal-supren en ĝi. Li renkontis min en la ĝardeno. Li portis frakon kaj blankan veŝton, kaj mi rimarkis ke li konstante kaŝrigardis min, kaj ke io ŝajnis ĝeni lin. Ni aŭdis la unuan matenmanĝan sonorilon, kaj tiam li diris, “Ĉu vi ne havas iujn taŭgajn vestaĵojn kun vi?”

“Taŭgajn vestaĵojn!” mi kriis, haltante en maltrankvilo. “Kial, ĉu io misas?”

“Ne, ne tiel”, li klarigis. “Mi celas vestaĵojn por iri al preĝejo.”

“Preĝejo”, mi diris. “Vi certe ne iros al preĝejo en tiel bela tago, ĉu? Mi sentis min certa, ke vi ludos tenison, aŭ iros al la rivero. Vi ĉiam kutimis tiel.”

“Jes”, li respondis, nerve skuante rozujon per branĉeto, kiun li ĵus prenis. “Vidu, ne temas ĝuste pri ni. Maŭdo kaj mi preferus tion, sed nia kuiristino, ŝi estas skota, kaj iomete severa en sia pensmaniero.”

“Kaj ĉu ŝi insistas, ke vi iru al preĝejo ĉiun dimanĉan matenon?” mi demandis.

“Nu”, li respondis, “ŝi taksas ĝin stranga se ni ne iras, kaj do ni kutime iras, nur en la mateno — kaj vespero. Kaj posttagmeze kelkaj el la vilaĝaj knabinoj vizitas, kaj ni faras iomete da kantado kaj tiajn aferojn. Mi neniam ŝatas ofendi ies sentojn, se mi povas eviti ĝin.”

Mi ne diris, kion mi pensis. Anstataŭe mi diris, “Mi

havas tiun lanan kompleton, kiun mi portis hieraŭ. Mi povas surmeti ĝin, se plaĉos al vi.”

Li ĉesis frapi la rozujon kaj kuniris siajn brovojn. Li ŝajnis peni rememori ĝin en sia imago.

“Ne”, li diris, kapneante, “mi timas, ke ĝi ŝokus ŝin. Estas mia kulpo, mi scias”, li aldonis pente. “Mi devus antaŭinformi vin.”

Tiam ideo venis al li.

“Mi ne supozas”, li diris, “ke vi emus ŝajnigi malsanon kaj resti en lito nur por la tago?”

Mi klarigis, ke mia konscienco ne permesus al mi partopreni tian mensogon.

“Ne, mi supozis, ke ne”, li respondis. “Mi devos klarigi ĝin al ŝi. Mi pensas, ke mi diros ke vi perdis vian valizon. Mi ne volus, ke ŝi pensu malbone pri ni.”

Poste iu dekkvaroble distanca kuzo mortis, lasante al li grandan heredaĵon. Li aĉetis bienon en Jorkŝiro kaj fariĝis “graflanda familio”, kaj tiam li ekhavis verajn problemojn.

De majo ĝis mezaŭgusto, krom iom da fiŝkaptado, kiu kutime finiĝis per pieda malsekiĝo kaj malvarmumo, la vivo estis iom trankvila; sed de frua aŭtuno ĝis malfrua printempo li trovis la laboron definitive laciga. Li estis bulforma viro, tute terurita de pafiloj, kaj seshora marŝado kun peza pafilo trans plugitaj kampoj, inter amaso da senzorgaj homoj, kiuj konstante pafadis nur colon for de aliaj nazoj, ĝenis kaj elĉerpis lin. Li devis ellitiĝi je la kvara matene dum malvarmaj oktobraj matenoj por ĉasi vulpidojn, kaj du fojojn semajne tra la vintro — krom kiam benita frostado donis al li mallongan ripozon — li devis peli la ĉashundojn. Tio, ke li kutime finis kun nenio pli serioza ol nuraj kontuzoj kaj etaj spinaj ŝokoj, probable ŝuldiĝis al lia bonŝanco esti malgranda kaj grasa. En densa arbaro li kutimis fermi la okulojn kaj rajdi rapide, kaj dek metrojn antaŭ rivero li komencis pensi pri pontoj.

Tamen li neniam plendis.

“Se vi estas kampara ĝentlemano”, li kutimis diri, “vi devas konduti kiel kampara ĝentlemano kaj akcepti la malglatajn aferojn kun la glataj.”

Poste malica fatalo kaŭzis, ke iu spekulacio duobligis lian riĉaĵon, do necesis ke li eniru la parlamenton kaj akiru jaĥton. La parlamento kaŭzis al li kapdolorojn, kaj la jaĥto kaŭzis al li naŭzon. Tamen ĉiusomere li plenigis ĝin per multaj luksemuloj kiuj enuigis lin, kaj li forvelis por monato da mizero en Mediteraneo.

Dum unu krozo liaj gastoj estigis ege interesan vet-skandalon. Li mem estis malsana en sia kajuto tiutempe kaj sciis nenion pri ĝi; sed la opoziciaj ĵurnaloj, eksciinte la rakonton, facilanime nomis la jaĥton “flosanta infero”, kaj *La policaj novaĵoj*<sup>1</sup> publikigis lian portreton kiel la ĉefkrimulon de la semajno.

Poste li eniris kulture rondon regatan de diklipa studento. Ĝis tiam lia plej ŝatata literaturo estis el la speco de Corelli<sup>2</sup> kaj *Frandajoj*<sup>3</sup>, sed nun li legis verkojn de Meredith<sup>4</sup> kaj la *Flavan Libron*<sup>5</sup> kaj penis kompreni ilin; kaj anstataŭ la *Gajecon*, li vizitadis la *Sendependan Teatron*<sup>6</sup> kaj nutris “sian animon” per nederlandaj ŝekspiraĵoj. Kion li ŝatis en arto estis bela knabino apud dometa pordo kun juna fraŭlo en la fono, aŭ infano kaj hundo farantaj ion ridigan. Oni admonis lin, ke ĉi tiaj aferoj estas malĝustaj, kaj

devigis lin aĉeti “Impresajojn” kiuj stimulis lian hepaton plej profunde ĉiufoje kiam li rigardis ilin — verdaj bovaj sur ruĝaj montetoj sub roza lunlumo, aŭ skarlatharaj kadavroj kun koloj tri futojn longaj.

Li diris humile, ke tiaĵoj ŝajnis al li nenaturaj, sed ili respondis, ke la demando tute ne temas pri naturo; ke la artisto vidis aferojn tiel, kaj ke kion ajn vidis artisto — ne gravas en kia stato li estis, kiam li vidis ĝin — tio estis arto.

Ili prenis lin al festivaloj de Wagner kaj privataj ekspozicioj de Burne-Jones<sup>7</sup>. Ili voĉlegis al li ĉiujn neĉefajn poetojn. Ili rezervis lokojn por li en ĉiuj teatraĵoj de Ibsen<sup>8</sup>. Ili prezentis lin en ĉiuj plej sentemaj rondoj de artista socio. Liaj tagoj estis unu longa festeno de alies ĝuado.

Unu matenon mi renkontis lin elirantan laŭ la ŝtuparo de la Arta Klubo. Li aspektis laca. Li estis survoje al privata ekspozicio en la Nova Galerio. Posttagmeze li devos ĉeesti amatoran prezenton de la *Cenci*<sup>9</sup> fare de la Societo Shelley. Poste sekvos tri literaturaj kaj artaj hejmkunvenoj, vespermanĝo kun hinda gravulo kiu parolas nenium vorton en la angla, *Tristano kaj Izoldo*<sup>10</sup> en la Koventĝardena Teatro, kaj balo ĉe lordo Salisbury<sup>11</sup> por fini la tagon.

Mi metis mian manon sur lian ŝultron.

“Venu kun mi al Epinga Arbaro<sup>12</sup>”, mi diris. “Kvarĉevala vetkuro komenciĝos en Ĉaringkruco je la dek-unua. Estas sabate, kaj certe estos multaj homoj tie. Mi ludos

keglojn kun vi, kaj ni provos ĵeti pilketojn al kokosoj<sup>13</sup>. Vi antaŭe estis lerta kun la kokosoj. Ni povos tagmanĝi tie kaj reveni je la sepa, manĝeti en *Trokadero*, pasigi la vesperon en *Imperio*, kaj vespermanĝi en *Savojo*. Kion vi diras?”

Li staris hezitante sur la ŝtuparo, kun la sopirantaj okuloj.

Lia kaleŝo haltis apud la trotuaro, kaj li eksaltis kvazaŭ el sonĝo.

“Mia kara homo”, li respondis, “kion homoj diras?” Premante mian manon, li sidiĝis, kaj la servisto fermis la pordon post li.

Tradukis **Russ Williams**

Pro ĉi tiu traduko Russ Williams iĝis laŭreato de *Liro-2010* en la branĉo “Prozo tradukita el la angla”.

## Notoj

1. *Ilustritaj Policaj Novaĵoj* (The Illustrated Police News). Ĉiusemajna ĵurnalo aperinta en Londono dum 1864–1938.

2. **Corelli, Marie** (aŭtente: Mary Mackay, 1855–1924). Brita verkistino, kies romanoj antaŭ la Unua Mondmilito estis ŝatataj de publiko kaj forte kritikataj de fakuloj pri literaturo.

3. *Frandajoj el ĉiuj interesaj libroj kaj periodaĵoj de la mondo* (Tit-Bits from all the interesting Books, Periodicals, and Newspapers of the World). Brita ĉiusemajna magazino (1881–1984)

4. **Meredith, George** (1828–1909). Angla verkisto kaj poeto, aŭtoro de la populara romano *La egoisto* (1879).

5. *La Flava Libro* (The Yellow Book). Brita trimonata literatura revuo (1894–1897).

6. *Gajeco ... Sendependa Teatro*. En *Gajeco* (The Gaiety Theatre, 1864–1939) estis prezentataj (muzikaj) komedioj kaj aliaj popularaĵoj. La *Sendependa teatro* (1891–1897) de la Sendependa Teatra Societo (Independent Theatre Society) estis fondita en Londono de la nederlandano Jacob Thomas Grein (1862–1935) por prezentado de nekomercaj dramoj kun arta valoro.

7. **Burne-Jones, Edward Coley** (1833–1898). Brita pentristo, vitralisto kaj dezajnistino.

8. **Ibsen, Henrik** (1828–1906). Norvega dramverkisto kaj poeto, unu el la fondintoj de la modernismo en teatro.

9. *Cenci* [Ĉenĉi]. Kvinakta tragedio, verkita en 1819 de Percy Bysshe Shelley (1792–1822).

10. *Tristano kaj Izoldo*. Mezepoka legendo, el kiu fontis pluraj kavaliraj romanoj en la 12a jarcento.

11. **Lordo Salisbury, Robert Gascoyne-Cecil** (1830–1903). Brita politikisto, trifoja ĉefministro de Britio (1885–1886, 1886–1892, 1895–1902).

12. **Epinga Arbaro**. Arbaro nord-oriente de Londono.

13. ... **ĵeti pilketojn al kokosoj**. Tradicia brita foirludo, en kiu oni ĵetas lignajn pilketojn al kokosoj por ricevi premiojn.

## Liro: Prozo tradukita el la angla

Ekde la 2001a jaro en la literatura konkurso *Liro* ĉiujare (escepte de la 2009a jaro, kiam en *Liro* estis nur originalaj branĉoj) estas proponata konkurs-branĉo pri proza tradukado el la angla lingvo. Preskaŭ ĉiuj premiitaj tradukoj jam aperis en *La Ondo de Esperanto* kaj iam aperos en antologieto de anglalingva novelarto, kiu enhavos ankaŭ kelkajn aliajn interesajn novelojn.

### La listo de la laŭreatoj

**Liro-2001.** O Henry. *The Cop and the Anthem*.

Laŭreato: Sten Johansson (Svedio).

**Liro-2002.** Saki. *The Lost Sanjak*.

Laŭreato: Sten Johansson (Svedio).

**Liro-2003.** Mark Twain. *The Celebrated Jumping Frog of Calaveras County*.

Laŭreato: Michael Ansaldi (Usono).

**Liro-2004.** Edgar Allan Poe. *The Devil in the Belfry*.

Laŭreatoj: Jean-Luc Tortel (Francio); Russ Williams (Usono).

**Liro-2005.** Mark Twain. *Journalism in Tennessee*.

Laŭreato: Jean-Luc Tortel (Francio).

**Liro-2006.** Ambrose Bierce. *A diagnosis of death*.

Laŭreato: Edmund Grimley-Evans (Britio).

**Liro-2007.** James Joyce. *Eveline*.

Laŭreato: Russ Williams (Pollando/Usono).

**Liro-2008.** Jack London. *Aloha Oe*.

Laŭreato: Scott Page (Usono).

**Liro-2010.** Jerome K. Jerome. *The man who lived for others*.

Laŭreato: Russ Williams (Pollando/Usono).

**Halina Gorecka**  
sekretario de *Liro*



## Literatura Mondo

La “Dua periodo” de la revuo *Literatura Mondo*, post la eklipsiĝo en 1926, komenciĝis per la numero de januaro 1931, kun la samaj ĉefredaktoroj Baghy kaj Kalocsay, redaktoroj Bodó kaj Szilágyi kaj plena taĉmento de tridek kvar ĉefkunlaborantoj.


En tiu numero, kiu enhavis uverture gratulojn de gravuloj pro la resurekto, estis reklamataj ses verkoj eldonotaj dum la jaro. La restariga elemento estis la eniro de nova posedanto, teknika aranĝanto kaj administranto Vilmos Bleier, jam administranto de la Hungara Esperantista Societo Laborista ekde 1924. Tre agema aktivulo, ĉefe en la laborista movado, eksa komercisto kaj diverstipa manlaboristo, li donis elanon al la eldona iniciato, rimarkinte ke la libromarkato povas havi potencialan aĉetantaron pli ampleksan ol literatura revuo. Tial li alprenis la tradician nomon de “Literatura Mondo” por starigota eldonejo.

Eldonejoj kun literatura fono estis tradicio en Hungario: en la komenco de 1921 Pál Balkány estis fondinta la Hungaran Esperanto-Servon, ĉe kiu aperis la unua Kaloĉaja kolekto *Mondo kaj Koro*. Samtempe Baghy fondis la Esperantan Rondon Amikan, kiu publikigis lian manskribitan poemfaskon *Bukedo*, ĉerpitan el la aperonta *Preter la vivo*.

La nomo mem “Literatura Mondo” estis funkciinta kiel eldona marko, kvankam ankoraŭ ne kiel oficiale establita eldonejo, jam plurajn jarojn pli frue, en la unua periodo de la gazeto. Fakte sub tiu prestiĝa ombrelo aperis en 1924 *Modernaj Robinzonoj* de Theodor Schwartz: sur la kovrilpaĝo estas skribite *Eldono de “Literatura Mondo”*, dum la interna paĝo mencias kiel eldoniston la firmon “Globus Presartinstituto Akcia Societo” kaj la daton 1923. La dat-duopo eble klariĝas per tio, ke la verko estis aperinta felietone dum sep numeroj de la revuo, de junio ĝis decembro 1923. “Globus” estis la presejo el kiu eliris la gazeto, do konfuzo inter la funkcio de eldonisto kaj presisto estas komprenebla. Krome, la diversaj libroj aperantaj dum tiuj jaroj estis reklamataj kiel mendebaj ĉe la revuo, kies administrado do funkciis, se ne kiel eldonejo, tamen kiel vigla distribua servo ankaŭ de alifirmaj eldonaĵoj, ekzemple de *Hirt*, *Heroldo*, *Esperanto Publishing*.

La unua verko kiu surportas “Literatura Mondo” kiel la nomon de establita eldonejo estas la romano *Hura!* de Baghy, tiamaniere reklamata: “Ĝi estas langomontro al la nuna kulturo tiom hipokrita, faranta ĉion por la mono kaj nur por la mono”. La verko estis eldonita en 1930, do pli frue ol la unua numero de la nova serio de la revuo. Laŭ la frontispica komento, ĝi estas “Ne romano, nur grimaco”, kaj la optimisma dediĉo “Al la revantoj por la nova Homo” diras multon kaj pri la aŭtoro kaj pri la eldonejo mem.

Naskiĝis tiam la poste famiĝinta emblemo, kun la flago metita kiel akso sur terglobo skize vestita per meridianoj kaj paraleloj.



Iom konfuziga estas la uzado en la engazeta reklamado de la formoj “Eldonejo de *Literatura Mondo*” kaj “Eldonejo *Literatura Mondo*”, kvazaŭ temus pri du entreprenoj malsamaj; fakte la administra kunigo de la eldonejo kaj de la gazeto venas preskaŭ tuj, por ke la konstanta defcito de la revuo (ĝi neniam superis 600 abonantojn) povu kvitiĝi tra la bilanca aktivo de la libroservo kaj de la eldonejo, kies verkoj aperis en 2000 ekzempleroj kaj ĝuis bonan vendadon.

La libroaperigo estis jam planita por 1931: unu libro ĉe ĉiu dua monato, kaj ili aperis akurate: de *Forge Mister Tot aĉetas mil okulojn*, de Kalocsay *Streĉita kordo*, de Baghy *Infero* (aperinta poste sub titolo *Sur sanga tero*, por ne krei konfuzon kun la *Infero* de Dante), de Szilágyi *Moderna fabelo* (aperinta poste sub titolo *Trans la fabeloceano*) kaj la romano kiu ricevos premion ĉe lanĉita konkurso (premio unuanime atribuita poste al *Homoj sur la tero* de Engholm).

Specimenaj ĉerpaĵoj el la libroj eldonotaj aperadis premiere en la revuo, allogcele; tiel pri *Parnasa gvidlibro*, tiel pri la *Infero* de Dante, tiel pri *El la “Verda Biblio”* de Lejzerowicz, tiel pri

*Eterna bukedo*; vere la gazeto kaj la eldonejo vivis simbioze. Meritplena estis ankaŭ la represo de jam elĉerpitaj verkoj, kiel poemaro *Preter la vivo* kaj novelaro *Dancu marionetoj*, ambaŭ de Baghy.

La krizo de 1931 frapis Eŭropon, sed la librofako de *Literatura Mondo* floris, ankaŭ profitante, per granda kuraĝo kaj financaj ĵongloj, la ondado de la kurzo inter la hungara mono kaj la dolaro. Kaj la promesoj por 1932 estis plej optimistaj: la *Hungara Antologio* sin prezentis kiel “la plej bela kaj la plej impona” inter la antologioj. Preskaŭ ekvilibra estis eldonado de originalaĵoj kaj de imponaj tradukoj; inter ĉi lastaj, la *Infero* de Dante, la *Romaj elegioj* de Goethe, la duvoluma *Arthistorio* de Hekler, ĉiuj tradukitaj de Kalocsay.

Alia genia ideo de Bleier estis la fono en 1933 de la Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj, kiu jam en la unua jaro atingis preskaŭ mil aliĝintojn: temis pri asocio kiu permesis, per interligita strukturo de abonoj kaj antaŭmendoj de la eldonaĵoj de *Literatura Mondo*, trioniĝon de la kostoj de stokado kaj distribuado.

La eldonejo estingiĝis kune kun la revuo en 1939, pro la antaŭmilita kriza situacio en Eŭropo. Dum sia okjara vivo ĝi aperigis okdekda volumoj, inter kiuj kelkajn el la plej gravaj verkoj ne nur en la literatura kampo, sed ankaŭ en la didaktika, kiel *Lingvo*, *Stilo*, *Formo* de Kalocsay, *Parnasa Gvidlibro* de Kalocsay-Waringhien, *La tuta Esperanto* de Seppik, kaj en la dokumenta, kiel la *Enciklopedio*, iniciatita de Ŝirjaev kaj redaktita de Kókény kaj Bleier. La lasta eldonaĵo presita en Hungario estis la *Svisa Antologio*, redaktita de Baur (1939).

Klopodoj teni la presadon aktiva ekster la militanta Eŭropo apenaŭ sukcesis, ĉar la konflikto envolvigis Ĉinion kaj Hongkongon, kien estis veninta komisiito de la eldonejo por esplori eblecojn de ĝia transportado tien. Bleier, fuĝinta al Parizo, tie mortis en 1940.

Entute la eldonejo ĉirkaŭ *Literatura Mondo* produktis ĉ. 8000 paĝojn, plejmulto el kiuj estis ege valora. Ĝia lasta streĉo estis la antologieto *Naŭ poetoj*, jam presita, sed ankoraŭ malpreta por surmerkato; el la milito saviĝis nur kelkaj nebinditaj kopioj. Sep jarojn post la fino de la milito alia kuraĝulo, Juan Régulo Perez, transprenos la torĉon de belliteratura eldonado.

Carlo Minnaja


## Ne prozo

Otira, Darik. *Vojaĝo al kuniĝo: Konfesoj de seksobsedito*. — Novjorko: Mondial, 2010. — 362 p.

Pseŭdonimulo Darik Otira ĉe la eldonejo Mondial aperigis 362-paĝan romanon *Vojaĝo al kuniĝo* kun subtitolo “konfesoj de seksobsedito”.

Estas iusenca defio recenzi ĝin, ĉar temas pri interesa fenomeno: la aŭtoro tutkore volas ŝoki la legantojn, sed tiuj apenaŭ ŝokiĝas. Estas pli facile imag-ebla dumlega enuiĝo, ol ŝokiĝo de averaĝa leganto, kiu vivas en la moderna socio. Ĉar la aŭtoro apenaŭ volis enuigi legantojn, evidentas koncepta mistrafo. Aŭ, kio ŝajnas pli reala, simpla malfruo. Nun la mondo (kaj, kiel unu el la eroj, ties esperantlingva parto) pli efike skueblas per aliaj temoj: terorismo, netoleremo, financaj maĥinacioj, ekologio. Troa seksumado (cetero, eĉ malgeja!) nun ne estas tia ŝoka temo. Probable eĉ antaŭ jardeko estis alie, sed ne nun.

La aŭtoro kun aprezinda pedanteco priskribas la seksan vivon de junulo Rikardo, kiu ekde adoleskanteco havas nehaltigeblan amordeziron. Sentante ĝin, li konstante kontentigas ĝin. La romano, specife ties unua duono, estas malinteresa ne pro kvanto da priskribitaj amoraj aktoj, sed pro manko de ĉio cetera. Rikardo nur seksumas kaj nenio pli. Verŝajne estus naive postuli de Darik Otira priskribojn de ĉirkaŭa medio aŭ sentoj de la protagonisto tiel, kiel farus Vladimir Nabokov aŭ Iris Murdoch. Sed la aŭtoro de *Vojaĝo al kuniĝo* povus iom pli postuli de si. Kiam temas pri erotika romano, kaj *Vojaĝo* ja pretendas, oni atendas ne nur rakontojn pri la amorado.



Ekzemple, s-ro Otira preskaŭ neglektas priskribojn de virina korpo, kio povus esti plej alloga parto de la romano — ja virinoj estas abundaj tie, do teorie estas amaso da beleco, kiu tute ne videblas entekste. Same pri eventoj, kiuj ne havas rektan rilaton al la seksaj aventuroj de Rikardo. Tio estas akceptebla, kiam temas pri negranda rakonto, sed ne pri tiom ampleksa romano.

Parolante pri *Vojaĝo*, oni trovas, ke ja estas historio (temo), sed mankas prozo. Ĉio en la teksto estas ligita kun la temo. Bona romano devas gvidi leganton en sian mondon — en la mondon, kiun konstruas la aŭtoro en ĉiu sia teksto (refoje: des pli, kiam temas pri tiom granda verko). Sed kiam la tuta teksto laboras nur por la temo, prozo ne aperas, mondo ne naskiĝas. Kion ni scias pri la

vivoj de plejpartego de liaj partnerinoj? Kiuj eventoj okazas en Britio kaj Germanio, la loĝlandoj de Rikardo? Kion la protagonistoj songas, ĉu ili malsanas, kio estas iliaj revoj, intencoj? Ni ne scias, sed sciunte ion, ni pli komplekse vidus la tutan bildon. Absoluta malkompleteco de la romano estas ĝia baza malavantaĝo.

Alia misflanko de la romano estas ties finalo. En la dua duono Rikardo troviĝas en konstanta rilato kun junulino, kio malebligas oftajn kokrojn, sed “kompense” li involviĝas en pornografian industrion (interalie, ĉi tiu parto de la teksto, kiu povintus esti ankaŭ interese, fariĝas rezulte eĉ teda pro ripetigo de samaj agoj). Ĉi tiu historio, kiu pro evidentaj konsideroj ne povus finiĝi bone, kondukas Rikardon unue al ŝanĝo de loĝloko, kaj poste al ruinigo de lia privata vivo. La ĉapitroj 78 kaj 79 (el 80) de *Vojaĝo* estas ties pinto. Tie preskaŭ mankas eventoj (kaj, feliĉe, enestas nur unu seksumo), sed estas ege interese legi pri suferoj kaj moralaj turmentiĝoj de Rikardo, kiujn kaŭzis nur lia miskonduto. La aŭtoro finfine detaligis sentojn de sia protagonisto. Sed bedaŭrinde la aŭtoraj penoj ne sufiĉis por la finalo. Verŝajne li (aŭ “ili”, se temas pri grupo de aŭtoroj — laŭ kelkaj supozoj tio estas reala) estis jam tro laca de verkado kaj preferis voki “dion el maŝino”. Ene de tri paĝoj la situacio, ĝis tiam absolute senespera, mirinde stabiligis. Tio lasas postguston de literatura amatoreco, kio estas des pli domaĝa, ĉar la mallertegan finalon antaŭas menciitaj preskaŭ majstraj ĉapitroj.

Preskaŭ tra la tuta romano iras movada linio. Rikardo posedas Esperanton, vizitas renkontiĝojn (IS, IJK, IJS) kaj eĉ kunfondas klubon en unu el siaj loĝlokoj. Certe, tio estas senpere ligita kun amoraj aventuroj, sed ĉi-aspekte la aŭtoro estas eĉ laŭdinda. Estas vaste konata, sed malofte agnoskata fakto de fojfoja malĉasto, kiu regas en Esperanto-kongresoj kaj seminarioj. S-ro Otira priskribis ĝin sufiĉe detale. Plia pluso de la libro estas kurioza teoria studeto pri pornografio en la 50a ĉapitro.

Oni povus ankaŭ analizi la lingvaĵon de *Vojaĝo al kuniĝo*, esplori ĝian strukturon, fari kelkajn konjektojn pri la vera nomo de la aŭtoro, sed ĉi-kuntekste tio estas plene malnecesita. Provo prezenti krudan koitadon esperantlingva artobjekto rezultis ne tre sukcesa.

Grigorij Arosev

## La unua animacia Esperanto-filmo



Post jarlonga studado kaj laborego, Simono Keith sukcesis diplomigi pri klasika animacio ĉe la Vankuvera filma studejo Vancouver Film School en Brita Kolumbio, Kanado. Post intensa eduko pri la principoj kaj fundamentoj de

animacio, li dediĉis pli ol kvar monatojn al kreado de filmo tradicie desegnita sur papero. La rezulto estas *Ĉapejoj*, la unua animacia filmo en Esperanto. Li tuj poste kreis plian filmon *Neĝuloj* en nur kelkaj semajnoj uzante komputilajn ilojn.

La 17an de decembro 2010 ambaŭ filmoj debutis ĉe lia diplomiga ceremonio, kiun ĉeestis ankaŭ esperantistoj. La 10an de februaro 2011, *Ĉapejoj* gajnis premion en loka filmkonkurso en Fort Collins.

Spektu ambaŭ filmojn rete:

<http://ĉapejoj.blogspot.com>

Simmon Keith Barney

Kulturo

## Libroservo de UEA: Kio furoris en 2010?

Laŭ la statistiko, el la aprila *Esperanto* la plej multe venditaj libroj en la Libroservo de UEA en 2010 estis tri: ŝlosilo por indonezianoj (255 ekz.), festlibro por Humphrey Tonkin (254 ekz.) kaj la nova eldono de *Pasporta Servo*. La pasintjara ĉampiono *Poŝamiko* sekvas ilin. Nur ok libroj estis venditaj pli ol 100-ekzemplere.

**Vendoj entute** (pli ol 100 ekzempleroj)

<i>Kunci Esperanto</i> (indonezia ŝlosilo)*	255
<i>La arto labori kune</i> *	254
<i>Pasporta Servo</i> (listo de gastigantoj)*	253
<i>Poŝamiko</i> (Beatrice Allée & Katalin Kováts)	178
<i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> (Boris Kolker)*	135
<i>La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka</i> (Gian Carlo Fignera)*	119
<i>Ĉu vi parolas tendare?</i> (Renato Corsetti, Mauro La Torre)*	110
<i>Lingvo kaj menso</i> (Noam Chomsky)*	106

Ĉar la nombrojn de entutaj vendoj ĉefe difinas mendoj de aliaj libroservoj, pli utilas vidi la statistikon pri unuekzempleraj vendoj, en kiu senrivale supras la festlibro *La arto labori kune*, kiun, malgraŭ la alta prezo (60 eŭroj) mendis 120 personoj.

**Vendoj unuekzempleraj** (pli ol 15 ekzempleroj)

<i>La arto labori kune</i> *	120
<i>Pasporta Servo</i> (listo de gastigantoj)*	51
<i>Beletra Almanako 7</i>	31
<i>English-Esperanto-English Dictionary</i> (John Wells)	30
<i>Beletra Almanako 8</i>	30
<i>Beletra Almanako 9</i>	27
<i>Lingvo kaj menso</i> (Noam Chomsky)*	25
<i>Homarano</i> (Aleksander Korĵenkov)	22
<i>Vojaĝo al kuniĝo</i> (Darik Otira)	21
<i>Plena ilustrita vortaro de Esperanto</i>	19
<i>Poŝamiko</i> (Beatrice Allée & Katalin Kováts)	19
<i>Baza Esperanta radikaro</i> * (Wouter Pilger)	18
<i>Kunci Esperanto</i> (indonezia ŝlosilo)*	18
<i>Esperanto de nivelo al nivelo</i> (Márta Kovács)	17
<i>Kvazaŭ ĉio dependus de mi</i> (Trevor Steele)	17
<i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> (Boris Kolker)*	17
<i>Zamenhof</i> (Aleksander Korĵenkov)	17
<i>Utila Estas Aliĝo</i> (Ulrich Lins)*	16

\* eldonaĵoj de UEA/TEJO

## Ricevitaj libroj

Aŭslendo, Rozalino = Ausländer, Rose. *Momentoj el eterno = Augenblicke aus Ewigkeit*. [Dulingva poemaro] / Tradukis el la germana Franz-Georg Rössler. — Gerlingen: Eld. Blajĥero, 1989. — 116 p., il. — [Donaco de Germana Esperanto-Biblioteko].

Bronŝtejn, Mikaelo. *Dek tagoj de kapitato Postnikov*. — 2a eld., reviziita kaj korektita. — M.: Impeto, 2010. — 352 p.; 400 ekz. — [Donaco de Svetlana Smetanina].

Bronŝtejn, Mikaelo. *Urbo Goblinsk*: Romano. — M.: Impeto, 2010. — 304 p.; 400 ekz. — [Donaco de Svetlana Smetanina].

*Dek gazetoj*: Artikolaro / Kompilis Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2010. — 32 p.; 500 ekz. — (Serio *Nia Trezoro*; Vol. 2). — [Donaco de Sezonoj].

*Dek libroj*: Artikolaro / Kompilis Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2010. — 32 p.; 500 ekz. — (Serio *Nia Trezoro*; Vol. 1). — [Donaco de Sezonoj].

*Germana antologio (ekde la plej frua epoko ĝis. ĉ. 1700)* / Tradukis el la germana Wilhelm Herrmann, Helmut Rössler. — Gerlingen: Eld. Blajĥero, 1985. — 328 p., il. — [Donaco de Germana Esperanto-Biblioteko].

Otira, Darik. *Vojaĝo al kuniĝo*: Kنفesoj de seksobsedito. — Novjorko: Mondial, 2010. — 362 p. — [Recenzoekzemplero].

## Ricevitaj gazetoj

Esperanto, 2011/3; Esperanto aktuell, 2011/1; Esperanto en Danio, 2011/1; Esperantolehti, 2011/1; Globusoj, 2010/1,2; Ĝenerala Informilo, 2011/165; La Lanterno Azia, 2011/1,2; La Movado, 2011/719,720; La Ondo de Esperanto, 2011/3; Monato, 2011/2,3; REGo, 2011/1; SES Informas, 2011/2; Tempo 2010/109.

## Redaktoro pri movadaj novaĵoj

TEJO ĝojas anonci, ke la nova redaktoro pri movadaj novaĵoj de TEJO estas Daniel Mrázek el Ĉeĥio.

Daniel Mrázek estis unu el kunorganizantoj de la 65a IJK en Liberec (2009); nun li estas la prezidanto de la Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ).

Laŭ la nova koncepto de TEJO pri *Kontakto*, farita baze de enketumado de legantoj, kie plimulto ŝatus legi iom da movadaĵoj, en *Kontakto* aperos kvar aldonaj paĝoj dediĉitaj al la movadaj temoj. *TEJO Tutmonde* ne plu aperos sendepende kiel gazeto, sed transiros al la aldonaj paĝoj de *Kontakto* sub la rubriko *Kontakto-Movade* kun pli profesie kolektitaj artikoloj.

Tamen ni substreku ke la financaj, jaraj kaj tiaspecaj raportoj ne ŝtelos spacon sur la belaj paĝoj de *Kontakto*, sed aldoniĝos apartaj bultenoj de la TEJO-oficejo.

Krom ke Daniel Mrázek kolektos kaj redaktos materialon por la rubriko *Kontakto-Movade*, li redaktos la retpaĝaron Tejo.org kaj kolektos materialon por aperi ĝin sur la paĝoj de la revuo *Esperanto*.

La unua *Kontakto* laŭ la nova koncepto kun aldonaj kvar paĝoj de movadaj artikoloj baldaŭ alvenos al viaj poŝtkestoj.

Tiuj, kiuj abonis nur al *TEJO-tutmonde* en la jaro 2010, ne timu ke ili ne ricevos la restantajn numerojn de la jarokolekto. La lastaj numeroj estas jam prilaborataj, inkluzive de la fina duobla numero sub la redaktado de Marcos Cramer kun retrospekto tra la historio de TT.

La estraro de TEJO elkore gratulas Daniel Mrázek kaj deziras al li frukto-donan laboron.

(Laŭ <http://tejo.org/>)

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia  
revuo en Esperanto kun  
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco  
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

[www.monato.net](http://www.monato.net)

**Flandra Esperanto-Ligo**  
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen  
[monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)

Por la februaraĵoj *Antikvaj Enigmoj* venis 17 respondoj, inter kiuj 15 estas ĝustaj. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans (Britio), Marek Blahuš (Ĉeĥio), Hannu Rasa, Bruno Lehtinen (Finnlando), Karl Heinz Schaeffer, Edeltraut Henning (Germanio), Pere Palà (Hispanio), Dorota Burchardt, Hanna Skalska, Janina Dega, Mirosława Kubicka, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Vjačeslav Rojdestvenskij, Svelana Konjašova (Ruslando), Roland Larsson (Svedio).

La libropremion ricevas *Janina Dega*, kiun ni kore gratulas!

#### La ĝustaj respondoj:

1. Muro;
2. Salmo;
3. Boto - doto - koto - roto - poto;
4. Por la kvara enigmo venis multe da diversaj ĝustaj respondoj, ekzemple homo - horo - moro - muro - muŝo aŭ homo - pomo - pumo - puŝo - muŝo.

## Sudoku

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampon per ciferoj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en la kvadratoj 3×3 la ciferoj ne ripetiĝu. La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 15a de junio 2011.

Komputile kompilis **Aleksej Korĵenkov**

				5		4	9	
7			2					3
			6		9	2		
9		5		7				4
3								7
4				6		3		1
		2	4		5			
6					8			9
	9	4		3				

## Juda humuro

### Telefonado

- Halo! Ĉu estas vi, Jakobo?
- Jes, mi estas Jakobo.
- Sed via voĉo ne sonas kiel tiu de Jakobo.
- Nu, sed mi estas Jakobo.
- Ĉu vi vere estas Jakobo?
- Certege!
- Aŭdu, Jakobo, mi estas Davido. Ĉu vi povas prunte-doni al mi kvindek dolarojn?
- Jakobo ĵus eliris. Mi diros al li, ke vi vokis.

El la kolekto de **Josef Ŝemer**

## Spritaĵaj splitoj kaj preskeraroj

### el la kolekto de reduktoro

#### Fo, mia kor!

#### aŭ: La konsulo, dua zamenfofo?

La konsulo, kiu donacis al la ministro la arĝentan zamenfofan jubilean medalon, klarigis la esencon kaj estontecon de la Esperanta Civito. (*La Konsulo akceptita de burundia ministro* // HeKo 472 5-C, 3 mar 2011, [esperantio.net/index.php?id=1621](http://esperantio.net/index.php?id=1621))

#### Bondeziroj sen poluro

UEA al kutimiĝis al la lapennismo sen Lapenna, ĉu ĝi spertot ankaŭ la bullerismon sen Buller? Ĉiukaze, senciran bondeziron al ĉiu. (*UEA survoje al ekzisto sen Osmo Buller* // HeKo 473 1-A, 17 mar 2011, [esperantio.net/index.php?id=1639](http://esperantio.net/index.php?id=1639))

#### Ŝanĝu sekson

#### aŭ: Juneca ardo

Havanta la kvalitojn de la juneco, viklecon, ardon, freŝecon ktp: (...) ŝi rejuniĝis post sia edziĝo. (la t. n. *Bonlingva Vortaro, kapvorto juna*, [vortaro.wikkii.com/vikio/index.php?title=jun/a](http://vortaro.wikkii.com/vikio/index.php?title=jun/a))

#### Lik' kaj fik' inter ĉeftemoj

Ekzistas 9 ĉeftemoj ... trafikejoj, monumentoj, publikeco ... (Herbert Mayer. *La komuna memoro de nia historio: fotoj en Interreto* // *Esperanto*, 2011, №3, p. 58)

#### Balado pri balido

Mi mem estas rezulto de la kongresa balo dum IJK en 1959 (Kim J. Henriksen, 24 feb 2011, [groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/18275](http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/18275))

#### Ne al kanibalado

... mi miamaniere estas vegetarano. Unu el la kialoj estas ne subteni la mortigon de bestoj. Kial do deziri morton de Osmo? (Gbeglo Koffi, 26 feb 2011, [liberafolio.org/2011/gbeglo-koffi-ne-deziras-la-morton-de-osmo-buller](http://liberafolio.org/2011/gbeglo-koffi-ne-deziras-la-morton-de-osmo-buller))

#### O(rgani)smo Buller, aŭ: Ĉu pleonasmo?

... tiu konate mirinda organismo, kiun oni nomas Osmo Buller. (Probal Dasgupta, 17 feb 2011, [groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/6237](http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/6237))

#### Desupre semi malpacon

... kiam ... lokaj agantoj ne sukcesas malkonsenti inter si, povas esti utile al ili, ke venu sugestoj de "supre"... tie povas troviĝi rolo por UEA. (Probal Dasgupta, 20 feb 2011, [groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/15581](http://groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/15581))

#### Papero ĝis... malapero

"Papera Revuo" [por la individuaj membroj, atendante ilian morton aŭ malaperon. (Renato Corsetti, 13 mar 2011, [groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/6334](http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/6334))

Plukis **István Ertl**

**La sekva Ondo aperos la 19an de majo 2011.**

**8a TAKE** (Tutamerika Kongreso de Esperanto)  
**46a BKE** (Brazila Kongreso de Esperanto)  
**31a BEJK** (Brazila Esperantista Junulara Kongreso)

de la 9a ĝis la 14a de Julio 2011  
**San-Paŭlo - Brazilo**

**Procezoj de regiona integriĝo  
 en la amerika kontinento:  
 la rolo de Esperanto**



[www.kongreso2011.org](http://www.kongreso2011.org)

Kongresejo:  
 Faculdade Santa Marcelina  
 (FASM), Unidade Perdizes,  
 Rua Dr. Emilio Ribas, 89



Amerika Komisiono



Brazilia Esperanto-Ligo



Ŝtata agentejo pri turismo



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

## Esperantujo vokas

Venu al la

Esperantista Kulturdomo

# Grésillon



[www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)

M.C.E., kastelo Grésillon, 49150 BAUGÉ, Francujo




**Kroatio.** 6 mar 2011 la kvinan sinsekvan fojon la Esperanto-Maskerada Kompanio Paždroč (Tohuvabohuo) partoprenis la Karnavalan Paradon en Rijeka inter 110 grupoj kun ĉ. 7 mil partoprenantoj. La sephoran maskparadon spektis ĉ. 100 mil urbanoj kaj gastoj. (*Vjekoslav Morankić / Boris di Constanzo*)



**Finnlando.** En la Vintraj Tagoj de EAF en Tampere (vd. p. 6) estis elektita nova asocia estraro; de maldekstre: Päivi Saari, Tiina Oittinen, Keith Uber, Tuomo Grundström, Jukka Nikoskelainen, Robert Bogenschneider, Börje Eriksson, Paula Niinikorpi. (*Robert Bogenschneider / Jukka Nikoskelainen*)




**Belgio.** Inter la sesioj en la Lingva Festivalo en Loveno (vd. p. 4) restis sufiĉe da tempo por interparoli kaj forigi la soifon per speciala biero, ofertita de *Esperanto 3000*. Multaj partoprenantoj post la lasta sesio longe restis kun la Esperanto-biero: gustumante, babilante kaj interkonatiĝante. (*Ivo Schenkel*)




Aleksander Korĵenkov. *Zamenhof*  
 Serio *Scio*, Volumo 9  
 64 paĝoj, 6 eŭroj



L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*  
 Serio *Scio*, Volumo 6  
 288 paĝoj, 24 eŭroj



Aleksander Korĵenkov. *Homarano*  
 Serio *Scio*, Volumo 8  
 320 paĝoj, 27 eŭroj



Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*  
 Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5  
 16 paĝoj, 3 eŭroj